

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-RO 557 (4) APRILO 1952



(foto : *Western Morning News*)

La Maja *Furry-Danco* en Helston, Anglujo
(*vidu paĝon 106*)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.
Urgajn informojn sendu rekte
al Rickmansworth

Traduko kaj represo de artikoloj estas
permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton.
Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Jara abono (1952) : 15 ŝil. anglaj (kun
membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)
Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :
1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅙ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :
2 pĉncoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 74 landoj
Eldonnumero 6000



Enhavo

Specialaj artikoloj :	Paĝo
La sekureco de Eŭropo kaj la internacia lingvo : <i>H. Jakob</i>	97
For la parazitemo ! <i>Mason Stuttard</i>	103
Cifer-mistiko : <i>Georges Agricola</i>	104
La Angloj Popoldancas : <i>C. D. A. Capp</i>	106
Nia Membraro : <i>C. C. Goldsmith</i>	109
Hidalgo : <i>J. Régulo Pérez</i>	113
Teatraĵo Originala (Belartaj Konkursoj 1951)—La Amo ne konas Landlimojn : <i>F-ino E. de B. Daly</i>	119
La 37-a Universala Kongreso de Esperanto	102 : 126
Konstantaj Rubrikoj :	
Enigma Konkurso N-ro 67	112
Esperantista Vivo	128
Internacia Konkurso 1952	111
Oficiala Informilo	127
Radio kaj Esperanto	118
Tra la Monda Esperantista	99

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 557 (4)

Aprilo 1952



La sekureco de Eŭropo kaj la internacia lingvo.

REZIGNACIE la mondo pensanta kaj rezonanta sekvas la fazojn de la nova sinarmigo. Ree ni, pacamikoj ĝisostaj, staras antaŭ grava dilemo. Videble ĉiuj klopodoj ekster-registaraj por prepari publikan opinion pri la **devoj** rezultigantaj por certigi la pacon, restis senfruktaj. Ĉu estus eble, ke kvin minutojn antaŭ tagmezo, ekzistos forto kiu ordonas *haltu!* je ĉiuj militpreparoj? Ni spertis, ke nek la Ligo de Nacioj, aklamita siatempe kun sincera ĝojo, nek la organizo de la Unuigita Naciaro, sukcesis konservi la pacon, aŭ tion, kion post 1918 ni opiniis, ke estas paco. Ne estas loko tie ĉi por serĉi kaŭzojn kaj proponi ian miraklan rimedon. La kaŭzoj estas multaj, variaj, malsamaj kaj ne forigeblaj per la simpla deziro homa. La realeco nun estas, ke ekster la UNO estas kreita organismo kiu devus laŭdire malebligi la militon.

La kreo de Eŭropa Armeo estas decidita. La relativeco de ĉio montriĝas ankaŭ en tio, ke la partopreno germana en tiu ĉi “pacarmeo” estos fakto. Sento de dubo kaj de timo manifestiĝas ĉie, kie la paŝo de la kolosa militmaŝino germana ankoraŭ nun vibras en la oreloj.

Jen la situacio! Ne estas nia povo ŝanĝi tion. Nia idealo certe ne estas morti heroece ĉiun kvaronjarcenton, kaj ne ni opinias ke “la milito estas je la origino de ĉia realaĵo”. Nia tasko ne estas fari vundojn, sed eviti aŭ kuraci ilin.

Kaj unu el ĉi tiuj kuraciloj estas ekster ĉia dubo, la internacia lingvo. Ke la malsameco de lingvo en internaciaj aferoj estas ĝeno, neniu plu neas. La lamulbastono de lertaj kaj spertaj interpretistoj kaj de komplikaj aparatoj ne estas solvo de tiu ĉi problemo.

Post nelonge ekzistos supozeble ia “Eŭropa Armeo” aŭ aro da naciaj armeoj sub komuna komando kaj direkto. Inter la staboj estos regula interŝanĝo de komunikoj, vigla interrilato teknika. En kia lingvo tio okazos? Nu, oni kreos rapidkursojn de angla kaj franca lingvoj, kio por anoj de unu el la du estas ankoraŭ akceptebla. Sed la aliaj havos la plezuron serioze studi **du** lingvojn! La arma kampo estos Germanujo kaj ne estas videble, ke la germanoj simple cedos en tiom sentimenta afero, kia estas la nacia lingvo—tute ne parolante pri la sennombraj komplikaĵoj rezultigantaj el (ĉiam) neperfekta posedo de l’ alia idioma.

Krom la faka rilato arma inter staboj ekzistos la rilatoj inter la soldatoj mem. Ĉu serioze oni pensas fari tiajn rapidkursojn laŭ la maniero de ia baza kombinaĵo, t.e. simpligita angla, franca kaj eble eĉ germana lingvo? La ne-volo vidi veran solvon de la problemo, farante provon kun Esperanto, estas versimila. Kiom da konfuzoj, eraroj kaj malinterkonsentoj povus esti evitotaj, se ekzistanta rimedo elpruvita, estus uzata. Estas la manko de Esperanto, ke ĝi **ne estas varo**, kies fabrikado donus materian profiton. Se ĝi estus, ĝia uzo estus tiom ĝenerala, kiom estas la uzo de ia laŭtempa medikamento.

Nia propagando staras nun antaŭ la demando kiel ni povos prezenti al decidantaj povoj nian solvon. Eventuala klopodo tiudirekte devus proponi prov-kursojn de Esperanto, kies fino estus kronata per renkontiĝo diversnacia por dokumenti fakton. La tuta afero certe diskutiĝos post nelonge. Jam nun, ni devus pensi je la redakto de frazaro militista, tia kia ekzistis por la Ruĝa Kruco, similaj presaĵoj kiel la ŝlosiloj.

Eble principaj milit-kontraŭuloj kondamnos tiun ĉi ideon. Je tio nia respondo estas simpla: lingvo servas al ĉiuj kaj nia fina celo estas la ĝeneraligo de la internacia lingvo, por ĉiuj bezonoj. Esperanto ne estas ludobjekto sed realeca ilo por forigi la **ne-**, **mal-** kaj **mis-** komprenon en la mondo. Por atingi tion, ni devas atenti ĉion, eĉ se tio okazos sur vojo ne celita komence.

La sama lingva problemo ekzistas ankaŭ en Orienta Eŭropo. La kompleta malapero publika de Esperanto en la Sovet-Unio, la superregado de la rusa lingvo, forigas entute la ideon entrepreni saman klopodadon en la landoj orient-Eŭropaj. La deviga instruado de la rusa idioma en la aligitaj landoj orientaj jam estas respondo je ĉia demando pri Esperanto en tiu ĉi idea vico.

H.J.

Verkinte la supran artikolon, mi recevis la revuon *American Esperanto Magazine* (Jan.-Feb.) kiu enhavas artikolon pri rilata temo. Vidu la tradukon sur paĝo 100 (Tra la Mondo Esperantista, Usono).

HELPU NIN!

Esperantistoj el la tuta mondo, helpu nin montri la utilecon de nia bela lingvo! Petu al la lernejestro de via kvartalo, ke li konsentu la partoprenon de siaj lernantoj al la internacia ekspozicio de infandesegnaĵoj organizota de KORPA KAJ MORALA EDUKA RONDO DE MOORTEBEEK je la komenco de Septembro 1952.

Tiu ekspozicio okazos sub la patronado de Sinjoroj Urbestro kaj Skabenoj de Anderlecht, ĉe Bruselo.

La partopreno al tiu ekspozicio montros la konkorddeziron ekzistantan inter ĉiuj la popoloj.

La desegnoj temos pri: LA FOLKLORO DE MIA REGIONO.

Nu, Esperantistoj, penu por nia sukceso!

**Sendu al: WALRAEVENS, Rajmundo,
10 Rue Rabelais, Bruselo, Belgujo**



Tra la Mondo Esperantista



Argentino

Fondo de E.-Asocio en la grava urbo La Plata. Post kelkaj klopodoj de la komitatanoj de la Argentina Esperanto-Ligo, oni sukcesis fondi E.-Asocion en La Plata, la ĉefurbo de la plej granda argentina provinco.

VI-a Kunveno de enlandaj delegitoj. La nova Asocio ĵus starigita en La Plata, prenis sur sin la taskon ĉion aranĝi por okazigi la VI-an Kunvenon de enlandaj delegitoj, kiu okazos je Pasko, 10-12 Aprilo 1952. Inter la programeroj estos laborkunsidoj, ĵarkunveno, ekskursoj, prelegoj, publika vespero kaj ekspozicio.

Italujo

Instruado en Italaj Lernejoj : de la Itala Esperanto-Federacio ni ricevis la jenan informon :—

“Mi estas tre ĝoja, ke mi povas sendi al vi la jenajn informojn por publikigo : **La Unua Paŝo por la enkonduko de Esperanto en la Italaj Lernejoj.** Lia Moŝto la Profesoro A. Segni, Ministro de la Publika Instruado, partopreninte la malferman kunsidon de la itala nacia kongreso de Esperanto (okazinta en Pisa dum la lasta oktobro) estis frapita de la praktikaj sukcesoj de Esperanto en la diversaj kampoj, kaj okaze de vizito al li farita de Profesoro Canuto, promesis helpi iel al nia movado.

Bedaŭrinde li poste malsaniĝis, kaj dum kelke da tempo li devis lasi sian oficon. Nur nun, post lia resaniĝo,

aperis cirkulero, sendita al “Prevveditori agli Studi”, t.e. al tiuj, kiuj en ĉiu provinco estras la lernejojn unuagradajn kaj mezgradajn. Per ĝi ne nur oni instigas ĝenerale al favoro por Esperanto, sed oni donas permeson disponigi la ejojn por kursoj organizitaj ankaŭ de la lokaj grupoj. Estas ankaŭ interese, ke oni mencias la *Italan Esperanto-Instituton*, kiu ekzistas jam de 1912, sed ĝis nun ne havis iun oficialan rekonon.

Jen la teksto de la cirkulero :

Ministerio de la Publika Instruado

Romo, 24-an de Febr. 1952

Prot. N. 12411

Al la Provincestroj pri instruado,

Tiu ĉi Ministerio, kompreninte la utilecon kaj la intereson, kiuj povas deveni el la kono kaj disvastigo de Esperanto, opinias ke oni devas favori al ĝia studado en tiuj centroj, almenaŭ kie jam ekzistas kapabluloj por la dirita instruado.

Por la celo, tial, faciligi la konon de tiu helpa lingvo, tiu ĉi Ministerio havas nenion kontraŭan por ke oni kuraĝigu la iniciatojn celantajn organizi la studadon de Esperanto, per la disponigo, ankaŭ, de lernejaj ĉambroj por la starigo de kursoj.

Oni atentigas ke por la teknikaĵoj pri la instruado, la lernejaj aŭtoritatoj povos interrilati kun la Itala Instituto de Esperanto (Firenze, via Dei Neri 6) aŭ kun la lokaj reprezentantoj de la dirita Centro de Studoj.

La Ministro : Segni.”

Portugalujo

La kunveno de NATO en Lisboa, 20-25 februaro. La nova Portugala Esperanto-Asocio vigle komencis laboron por nia afero: ni citu la jenajn frazojn el letero de ĝia Prezidanto, S-ro Saldanha Carreira, U.E.A. Komitatano.

“Profitante la grandan kunvenon de NATO en Lisboa kaj laŭ la alvokoj de S-ro Malmgren (UEA Prezidanto), el Svedujo, kaj S-ro Lapenna (UEA Estrarano), el Anglujo, ĝi presigis kelkajn centojn da cirkuleroj, en kvar lingvoj (Portugala, Angla, Franca, Germana) kaj disdonigis ilin en la Teknika Supera Instituto, sidejo de NATO, logante la atenton de la membroj al Esperanto kaj al la malelegantaĵoj okazintaj dum la kongreso.

“La afero estas des pli interesa, ke la leterocirkulero estas permesita de la Cenzuraj Servoj kaj la distribuo estas farita de SNI (Sekretariado Nacia por Informo), organismo kiu dependas de la Ministeria Prezidenteco kaj kie funkciis la specialaj servoj de NATO. Do estis oficiala la distribuo. Ni kredas ne erari dirante ke la unuan fojon en tiaj grandaj kunvenoj nia Esperanto sin montris prezentita de oficialaj instancoj.

“Estis tiel interesa la apogo de SNI, ke ĝi sendis al nia Asocio la kompletan liston de ĉiuj partoprenantoj en NATO, ne nur kun nomoj kaj postenoj kiel kun la nomoj de la gastantaj hoteloj kaj respektivaj ĉambronumeroj. Vere ora apogo, kiun nia PEA profitis . . .”

Svislando

Junulara Kunveno. La Junular-Sekcio de la Svisa Esperanto-Societo organizos dutagan Internacian

Junular-Kunvenon je 3-4 majo en Basel. Esperantistaj gejunuloj el ĉiuj landoj estas bonvenaj. Postulu la programon tuj ĉe B. Graf, Hubelweg 7, BIEL-BIENNE, Svislando.

Usono

Ni publikigas la suban tradukon de anglalingva artikolo, kiu aperas en la *American Esperanto Magazine*, Vol. 66, n-roj 1-2, Jan.-Feb. 1952.

“Usona Armeo utiligas Esperanton kiel la oficialan lingvon de la ‘Atak-armeo’.

“Dum la pasintaj jaroj ekzistis onidiroj pri korpusoj da soldatoj en nekutimaj uniformoj, kiuj ŝajne parolas Esperanton. Raportoj el Eŭropo ankaŭ indikis, ke soldataroj nomitaj ‘Atakantaj’ en Usonaj manovroj ankaŭ ŝajne parolas Esperanton.

“Kaj kio estas ‘Atak-armeo’? La vorto signifas tutan unuon en la Usona militistaro, enhavantan kaj oficirojn kaj soldatojn, kiel en la ordinara armeo, sed ĉi tiuj soldatoj reprezentas ‘La Malamikon’ je manovroj. Estas ilia devo utiligi ĉiujn rimedojn, kiujn eble utiligus malamiko kontraŭ nia armeo. Kiel taktika unuo, do, uzata por vigligi nian regulan armeon la ‘Atak-armeo’ utiligas specialan propran lingvon ‘el pluraj naciaj lingvoj’ laŭ lastatempaj novaĵ-onidiroj.

“Du el niaj membroj ricevis leterojn de la Milita Ĉefstabejo de la ‘Atak-armeo’, kiuj pravas la fakton, ke la lingvo uzata ja estas Esperanto. Ni rekonas nian ŝuldon al Van Allen Lyman, Gamboa, ĉe la Panama Kanalo-zono, kaj al Robert C. Betteridge, Long Beach, California, pro la sekvantaj leteroj de la Ĉefstabejo de la ‘Atak-Armeo’. Ni

plezure publikigas ĉi tiujn leterojn kiel signifan pruvon de la kreskanta, praktika utiligo de Esperanto en Usono.

*'Atak-armea' Ĉefstabejo,
16 decembro 1950.*

"Kara S-ro Lyman,

Multan dankon pro via letero de la 26-a de novembro rilate al la 'Atak-armeo'.

La sugesto proponita de vi, ke estu utiligata Esperanto kiel la lingvo de la 'Atak-armeo' jam estas konsiderita kaj jam antaŭ iom da tempo akceptita. Novaj lernolibroj de la 'Atak-armeo' estas de kelkaj monatoj en preparo, kaj post eldono la oficiala lingvo de la 'Atak-armeo' estos Esperanto. En ĝi estos vortaro kaj bibliografio de taŭgaj libroj pri tiu lingvo.

Mi komprenas vian intereson pri la afero kaj certigas al vi, ke la sugestoj faritaj de vi pri Esperanto jam estas konsideritaj kaj adoptitaj.

Sincere via,

Harry Henry,

Kolonelo, Infanterio.

"Responde al la ĉi supra letero de Kolonelo Henry, demando de S-ro Lyman pri la nova lernolibro kun Esperanta vortaro kaj bibliografio havigis respondon de F. de L. Comfort, Kolonelo, Stabestro, je 21 januaro 1951, ke la lernolibro estas klasifikita 'sekreta' kaj ke oni ne povas provizi ĝin al demandantoj. Ni komprenu, ke necese estos tiel, kaj ni ne faru nenecesan korespondadon kun la Ĉefstabejo. Ni petas al ĉiuj niaj membroj, ke ili sendu necesajn komentojn al la Centra Oficejo de E.A.N.A.

"Ni presigas la sekvantan leteron de la 'Atak-armeo' al Robert C. Betteridge, kiel klarigon de la utiligo de Esperanto, kaj ni estas rekonemaj

al Kapitano Sachs pro lia afableco permesi eldonadon en American Esperanto Magazine. Li skribas:

*'Atak-armea' Ĉefstabejo,
15 novembro 1951.*

"Kara S-ro Betteridge,

Via letero de la 20-a de oktobro estas plusendita al ĉi tiu ĉefstabejo por respondo.

Esperanto estas adoptita kiel la oficiala 'Atak-armea' lingvo. La uzo de Esperanto tamen ne signifas, ke la 'Atak-armeo' ne utiligos aliajn lingvojn. La tuta 'Atak-armea' pripensaĵo, kiel vi kredeble scias, estas entute imaga kaj iu simileco al iuj individuoj aŭ areoj estas nura koincido.

Limigita Esperanta vortaro estas kunigita de la 'Atak-armea' Ĉefstabejo por uzo ĉe manovroj. Estis necese fabrikigi kelkajn militajn vortojn kaj terminojn ordinare ne troveblajn en Esperantaj vortaroj.

La ĉefa uzo de Esperanto nuntempe estas limigita al mallongaj frazoj kaj vortoj uzitaj je 'Atak-armeaj' dokumentoj kaj formuloj.

Ĉi tiu ĉefstabejo ne kontraŭstaras la publikigon de informo en via nacia gazeto, ke Esperanto jam estas adoptita kiel la oficiala 'Atak-armea' lingvo.

Pro la komandanto:

William H. Sachs,

Kapitano, Infanterio.

*Funkciaanta Help-Adjutanto-
Generalo."*

Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj (I.A.P.K.)

Raporteto pri 1951. 200 membroj en 18 landoj. La asocio estis reprezentita ĉe la U.K. en Munkeno, kie membroj kunvenis plurfoje.

El 17 landoj la asocio ricevis filatelaĵojn (noveldonitajn poŝtmark-

daŭrigo sur p. 102



Oslo Vokas Vin!

Adreso : Boks 942, Oslo, Norvegujo.

Bankokonto : Nen Norske Creditbank No. 6099 B/179.

Poŝtgirokonto : 153. 85.

Honora Komitato : La ĉefministro de Norvegujo, S-ro Oscar Torp, konsentis esti membro de la honora komitato de la 37-a U.K. Simile konsentis la Urbestro de Oslo, S-ro Olav Bull, kiu esprimis deziron bonvenigi la kongreson en Esperanto.

Dua Bulteno : La bulteno kun mendilo por loĝejoj kaj ekskursoj estas sendita al ĉiuj aliĝintoj. Ni reatentigas, ke tiu bulteno ne estas por ĝenerala disdono.

Kotizo : Ni atentigas, ke la kotizo pli altiĝis en la fino de marto. Nun ĝi estas: Kongresano : 45 ŝil. (UEA Individua

Membro pagas 5 ŝil. malpli)
Edzo aŭ edzino de kongresano :

22ŝ. 6p. (UEA I.M. pagas 2ŝ. 6p. malpli)

Junul(in)o ne pli ol 20-jara : 15 ŝil.

Statistiko : (ĝis fino de feb.)
Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrujo 8, Belgujo 17, Brazilo 1, Britujo 144, Danujo 33, Ebura Bordo 2, Finnlando 39, Francujo 84, Germanujo 47, Hispanujo 2, Indonezio 1, Irlando 1, Italujo 37, Izraelo 2, Jugoslavujo 6, Kanado 1, Kenjo 2, Nederlando 29, Norvegujo 143, Polujo 2, Portugalujo 1, Svedujo 120, Svislando 13, Turkujo 1, Urugvajo 1, Usono 5. Sumo : 745 el 28 landoj.

Mason Stuttard,
Konstanta Kongresa Sekretario.

daŭrigo (de p. 101)

ojn, unuataĝkovertajn, k.c.), kiujn oni vendis al la membroj.

Por 1952 : la jarkotizo estos 1 Usona Dolaro pagebla per neuzitaj poŝtmarkoj. I.A.P.K. eldonos multobligitan propran organon minimume 8 foje. Estos reprezentantoj ĉe la U.K. en Oslo.

Bontemplanoj !

Internacia Kongreso de la tutmondaj Bontemplanoj okazos 24-31 julio 1952 en Hamburgo, Germanujo. Espereble la kongreso estos vizitata de multaj eksterlandaj Bontemplanoj. La Hamburgaj gefratoj klopodos fari

la kongreson tiel bela, ke ĉiuj partoprenantoj neniam forgesos ĝin. Samtempe okazos internacia renkontiĝo de la Bontemplana Junularo en granda tendaro en la bela ĉirkaŭaĵo de Hamburgo.

La membroj de la Hamburga Esperanto-Societo esperas, ke multaj Esperantistaj Bontemplanoj vizitos la kongreson, kaj volonte ili estos je ilia dispono. Kiu deziras detalajn informojn, bonvolu skribi al samideano instruisto W. Kather, Schuldenbrooksweg 48, Hamburg-Bergedorf, Germanujo. (Aldonu afrankon aŭ respondkuponon.)

Mason Stuttard :

For la parazitemo !

JU pli longe mi aktive partoprenas en la Esperanta laboro des pli multe mi miras je la sinteno de multaj tiel nomitaj Esperantistoj. La grandega plimulto de Esperantistoj konas la veron de tiu malnova principo, ke “pli bone estas doni, ol ricevi”, sed en la lastaj jaroj ni vidis kreski alian specon de “samideano” (!) kies sola penso ŝajne estas, “**kion** mi povos ricevi el Esperanto?”

Estante sekretario de la kongreso jam nur kelkajn monatojn mi ricevis kaj vidis multe da leteroj kaj petoj pri senpaga partopreno en la kongreso, senpaga aŭ malmultekosta loĝigado flanke de lokaj Esperantistoj, kaj similaj. Oni povas kompreni tion, kiam temas pri homoj en landoj, kie oni absolute rifuzas doni valuton, aŭ nur malgrandan valuto-provizon ; sed estas fenomeno de tiuj petoj, ke la plimulto el ili venas el landoj, kie la kutimaj kaj konataj valuto-problemoj ne estas tre akutaj. Preskaŭ konstanta fenomeno ĉe la petoj pri helpo estas ankaŭ la fakto, ke la petanto evidente ne estas informita pri la plej simplaj kaj plej elementaj faktoj pri la Esperanto-movado (ekz. skribas al personoj, kiuj havas nenian rilaton kun la kongreso, aŭ adresas leterojn kun misliteritaj nomoj k.s. kaj entute montras, ke li havas nenian aktivan kontakton kun la organizita movado). Konkludo estas nur, ke tiuj personoj tute ne pagas kotizon al ia organizaĵo. Ŝajne tio estas konfirma faktoro pri la ĝeneralaj konkludoj.

Mi ĵus legis leteron senditan al delegito en Britujo. La skribinto diras, ke li vojaĝis tra tuta Eŭropo per Esperanto kaj esperas baldaŭ viziti Marokon kaj Nordan Afrikon.

Intertempe li volas viziti Britujon. Unu frazo en la letero frapas : “ . . . kaj ĉion mi faris preskaŭ sen mono . . . ” La sugesto estas, ke ankaŭ al Britujo li volas veni “sen mono” ĉar li petas taŭgajn kontaktojn.

Ankaŭ en tiu rilato mi rimarkas strangan sintenon. Ekzistas homoj, kiuj ŝajne kredas, ke la nura kaj simpla fakto, ke ili studis Esperanton, iel donas al ili specialajn privilegiojn kaj rajtojn, la rajton je senpagaj gastigado, nutrado, kaj la rajton vojaĝi tra la mondo je la kosto de Esperantistoj, kiuj ne estas tiel bonŝancaj. Multajn rakontojn mi aŭdis pri tiaj vizitoj en Esperantistaj rondoj.

En unu periodo de mia vivo mi travivis malriĉon tian, ke mi ne povis partopreni eĉ en regionaj kunvenoj Esperantistaj. Kvankam mi ĉiam aktivis sur la Esperanta tereno la penso almozpeti neniam venis en la kapon. Kaj en la krizaj jaroj de la intermilita tempo multege da gesamideanoj same situis ekonomie. Se oni ne havas rimedojn vojaĝi oni restas hejme. Se oni ne havas monon por kongresoj, oni rezignas kaj . . . esperas pri pli bona estonteco.

Ŝajnas al mi, ke konvenas meti ĉi tiun demandon antaŭ nian publikon por serioza pripenso. En la Centra Oficejo de U.E.A. oni konas multajn ekzemplojn de ekspluataĉo al kaj de Esperantistoj. La ideala karaktero de nia movado faras la adeptojn aparte facile perforteblaj. Ili pripensu, ĉu tia malavara subvenciado de verdstelaj vagabondoj efektive estas bona por nia afero. Ĉu tiajn homojn ni

daŭrigo sur p. 105

Georges Agricola :

Cifer-mistiko

LA matematiko, la statistiko, ĝenerale ĉio kio ligiĝas kun ciferoj kaj nombroj estas rigardata kiel teda, senfantazia, enuiga. Kiu laboras profesie pri ciferoj ja ne entuziasmiĝas pri ciferkolonoj kontrolataj kaj komentataj. Tamen la matematikisto kaj la statistikisto povas "varmiĝi" pri problemoj same kiel bilancisto povas pasie pasigi horojn je orientiĝo pri ciferoj en bilanco. Nu, ĉio tio ja estas ligata kun objektoj aŭ aferoj; la ciferoj estas nur helpiloj, esprimo de kvanto. Tamen troviĝas io en la ciferoj, jam frue evidenta al pensanta homo. Pluraj ciferoj inter **unu** kaj **dek tri** havas sian mistikon kaj estas simbolo por io. **Unu**, la Kosmo, la dieco, **Du**, la fundamenta principo de la vivo, **Tri**, la triunueco kristana, la tri virtoj, kredo, amo, espero, la bramana percepto pri kreo, vivo, morto, kaj aliaj simboligoj. **Kvar** estis por la antikvuloj la elementoj de la tero, kaj por la kristanoj la teraj virtoj. **Kvin** estas la simbolo por la vundoj de Kristo.

Sep estas sankta nombro proverbo popola; simile, *Sep estas nombro fatala*. **Sep** estis sankta nombro por la judoj kaj la kristana tradicio citas la sep lastajn vortojn de Kristo ĉe la kruco, la sep sakramentojn kaj la sep vortojn de la mizerikordo.

Sed la cifero **Naŭ** estas la plej mistika, eĉ mistera, ne pro la simbolismo, sed pro sia magia forto ne ekzistanta ĉe kia ajn alia cifero. Ekzemple: prenu la serion de naŭ multiplikita: 18, 27, 36, 45, 54, 63, 72, 81. Adiciu la du ciferojn kaj la rezultato estas ĉiam 9! Poste, ĉiu nombro, kies finsumo estas 9 ankaŭ

estas dividebla per 9, ekzemple: 126, 243, 315, 333, 441, 621 kaj tiel plu.

La oblo de ĉi tiuj nombroj ĉiam estas dividebla per 9. Ekzemple: 4689. Per adicio de la kvar ciferoj oni ricevas 27, do 4689 estas dividebla per 9. Strange, ĉu ne?

Sed ankoraŭ pli strange! Oni prenu kiun ajn nombron kaj skribu la saman nombron inverse. Se oni subtrahas la inverson de la unua nombro oni ĉiam ricevas nombron divideblan per 9! Ekzemple:

9452	1211	9876	5321
—2549	—1121	—6789	—1235
—	—	—	—
6903	90	3087	4086
—	—	—	—

Ĉu ne estas strange? Se oni nun subtrahas la sumon de ajna nombro de la originala nombro la rezultato ĉiam estas dividebla per 9. Ekzemple: 567. La sumo estas 18—

567	1276	25312
— 18 aŭ	— 16 aŭ	— 13
—	—	—
549	1260	25299
—	—	—

Ĉi tiuj ekzemploj tamen estas nur preludo por aliaj ankoraŭ pli "misteraj" kalkuloj. De du nombroj, kies finsumoj estas egalaj, la diferenco estas ĉiam dividebla per 9:

5621	finsumo 14
—3542	„ 14
—	—
2079	—
—	—
	kaj
381	finsumo 12
—291	„ 12
—	—
90	—
—	—

Alia eksperimento pri tiu mistera 9 estas la jena: ĉiuj nombroj kun samaj ciferoj, laŭvole ŝanĝataj en la vico, donas la saman rest-ciferon:

$$586 : 9 = 65 \text{ restas } 1$$

$$685 : 9 = 76 \text{ restas } 1$$

$$856 : 9 = 95 \text{ restas } 1 \text{ k.t.p.}$$

$$4315 : 9 = 479 \text{ restas } 4$$

$$5134 : 9 = 570 \text{ restas } 4$$

$$1345 : 9 = 149 \text{ restas } 4$$

$$3451 : 9 = 383 \text{ restas } 4 \text{ k.t.p.}$$

Ĉi tiuj ekzemploj konataj de ĉiu matematikisto surprizas laikon en la regno de ciferoj kaj nombroj. Kiu havas tempon kaj inklinon, kaj dum pluva vetero, trovas en ĉi tiu kombinado terenon de spirita gimnastiko multe pli cerbumiga ol la krucvortaj enigmoj.

Malnova problemo matematika estas, trovi formulon per kiu konstati tu, ĉu ia nombro estas tielnomata "prima nombro", t.e. dividebla nur per unu. Alloga eksperimento kun prima nombro estas dividi 1,000,000 k.s. per 3, 7, 11, aŭ 13—do per primaj nombroj. La adicio de la rezultato estas oblo de 9! Provo kaj pruvo: $1,000,000 : 7 = 142857$; finsumo de transversa adicio = 27, do dividebla per 9.

$$1,000,000 : 3 = 333,333 = 18$$

$$1,000,000 : 13 = 76,923 = 27$$

$$1,000,000 : 17 = 58,824 = 27$$

$$1,000,000 : 11 = 90,909 = 27$$

sekve ĉiuj transversaj nombroj estas divideblaj per 9.

La serion de la simbol-ciferoj kompletigu **Dek**, la deiro de la grandioza kalkulsistemo decimala, cifero kiun ni renkontas jam frue kiel simbolon (dek ordonoj de Mozeo!) **Dek unu**, prima nombro, estas en multaj landoj rigardata kiel nombro de la frenezuloj. La karnaval-societoj en Majenco kaj Kolonjo estas direktataj de "Komitato de la Dekunu-uloj", dek unu anoj, sed ne pli.

Kion diri pri la cifero 13? En Francujo kaj en aliaj landoj ĝi estas nombro de bona ŝanco; kontraŭe en Germanujo kaj en nordaj landoj ĝi alportas malbonŝancon. Ekzemple vojaĝi vendredon kiu estas la dektria tago de la monato, nepre estas malbona!

Laste, **Dek du**. Ĉu valoras memorigi la rolon de la nombro dek du en la historio de la homaro? Se oni parolas pri cifero "sankta" tiam dek du certe havas rajton de antaŭeco.

Nombro estas la esenco de ĉia realaĵo. Tiu ĉi parolo de Pitagoro finu tiun ĉi babiladon pri la cifermistiko.

daŭrigo (de p. 103)

volas en niaj vicoj? Ni memoras la homon, kiu post la milito vaste cirkuleris la Esperantistojn por pako da nutraĵoj kaj poste faris belan komercon ilin vendante! Lia landa asocio prave lin elpelis. Ni memoras pri prelegisto vaganta sen propraj rimedoj, en kies ĉeesto neniu ino inter la aĝoj de dek sep kaj sepdek

estas sekura. Kaj aliajn. Homoj, kiuj respektas nian aferon, ne tiel agas, kaj ilia konduto stampas ilin, kiel parazitojn.

Estas la devo de la sinceraj Esperantistoj ne subvencii tian parazitemon. Nur tiel ni forigos ilin el niaj vicoj. Precipe niaj delegitoj senindulge ignoru tiajn petojn, por ke la Jarlibro ne fariĝu "poŝlibro de la internaciaj vagabondoj"!


C. D. A. Capp :

La angloj popoldancas

SUR la strato, dancante je tre antikva ario, procesias jakete vestitaj viroj kaj iliaj parulinoj. Ankoraŭ dancante, la paroj eniras domon kaj, post iom da tempo, venante el alia domo, reaperas sur la strato. La urbo estas Helston en la provinco Cornwall. La tago estas la 8-a de majo. Tiu estas la precipa procesio kaj ĝi okazas tagmeze—la unua jam okazis je la 7-a horo kaj antaŭ tio oni alportis verdaĵojn el la apuda kamparo. Laŭ la legendo, je la 8-a de majo antaŭ multe da jaroj, aperis flamanta drako flugfalonta el la ĉielo sur la urbon ;

tiun ĝi maltrafis kaj dronis en apuda lago, kaj de tiam oni festas la saviĝon. La *Furry*-danco de Helston estas la plej konata printempa procesio,* tamen ankoraŭ okazas aliaj en Cornwall kaj en la mezlanda regiono Derbyshire. Tie en la urbeto Castleton je la 29a de majo okazas interesa procesio. Unua venas sur blanka ĉevalo viro nomata la reĝo. Li estas preskaŭ kaŝita per kaĝo farita el floroj kaj ĉiuspecaj verdaĵoj ; tion kronas aparta girlando. Lin akompanas reĝino (kiun rolon prenas sur sin viro). De tempo al tempo la procesio haltas kaj la paroj (iam geviroj, sed nuntempe infanoj) dancas senprogrese. Fine la procesio atingas

* vidu nian kovrilpaĝan bildon



(foto : W. A. Newell)

Moriska Trupo el Abingdon

la preĝejon kaj tie oni histas la girlandon ĝis la supro de la turo.

Ne malproksime en Winster okazas procesio de ok virparoj. Unu vico portas inĉapelojn kaj oni eĉ nomas ilin virinoj. Ankaŭ ĉi tie ni trovas procesian kaj senprogresan dancojn. Bedaŭrinde ĉi tiu festo en la lastaj jaroj okazis nur sporade. En ankoraŭ alia urbeto en la regiono, Tideswell, okazas pluraj procesioj, tamen en la somermezo. En tiaj procesioj folkloristoj vidas restaĵon de kelta religia ceremonio printempa, kiu celas, inter alie, fekundigi la teron.

Ĉi tie estas konvene mencii la aperon en la sudoriento de du kvazaŭĉevaloj. Ambaŭ unue aperas en la nokto de la 30a de aprilo kaj poste en la maja tago mem. La "ĉevalo", apartenanta al la apudmara urbo Padstow, estas granda besto, portata sur la ŝultroj de viro, kiu, krom la kapo, estas tiel kaŝita. Ĝi estas nigra, kaj fakte iam estis kovrita per malseka gudro. Juna virino, se ŝi jam estis edzino, sentis sin bonŝanca ricevinte de ĝi makulon ĉar tio signifis, ke ŝi ricevos infanon. Muzikistaro kaj diversaj roluloj akompanas la ĉevalon, kiu, dum la daŭro de sia danco, jen prancas, jen ŝajne mortas. Kontraŭe, la ĉevalo, kiu aperas en Minehead, ankaŭ apudmara urbo, estas bunte kolorita. Kelkaj folkloristoj kredas, ke la bestoj ne estis ĉevaloj, sed krokodilo kaj bovino respektive, kaj ke ili estas restaĵo de kultoj enportitaj el antikva Egiptujo. (Estas sciate, ke en antikva epoko viroj el apud-mediteraneaj landoj venis al sudorienta Anglujo serĉante stanon).

Kredeble la Angla popoldanco plej konata ekster Anglujo estas la moriska danco (Angle : *morris/morisco*). "Ni ne pli timu, ol se ni aŭdus, ke Anglujo

sin okupas pri Pentekosta moriska danco" diras Franca princo en la dramo "Henriko V" de Shakespeare, kaj literaturo eĉ pli antikva aludas pri la morisko. En la mezlando moriska trupo konsistas el ses dancantoj ; en la graflando Lancashire kaj apud la Kimra bordo ok estas la normo. Krom la muzikisto troviĝas ekstraj roluloj, el kiuj la ĉefa estas la "stultulo", kiu fakte estas ofte lerta dancanto. Lia rolo estas vigligi la dancantojn kaj bonhumorigi la vidantaron. La mezlandaj trupoj portas sub la genuoj aron da sonoriletoj, kaj ornamas sin per koloritaj rubandoj kaj ofte per florhavaj ĉapeloj. Ili ritme svingas mantukojn, sed ankaŭ de tempo al tempo anstataŭe uzas lignajn bastonojn. En la nordoriento oni svingas mallongajn bastonojn, kelkfoje faritajn el katuno kaj vato.

Pro la nomo *morris*, kiu signifas 'maŭron', oni iam kredis, ke la danco venis de Hispanujo, kie troviĝas danco en kiu unu vico estis "kristanoj" kaj la alia "maŭroj" ; kaj tion la interfrapado de bastonoj en la Angla morisko ŝajne konfirmas. Hodiaŭ la plimulto de folkloristoj kredas, ke la morisko (formo komuna al pluraj landoj) estas pli antikva ol la kristanismo, kaj ke la Angla formo rezultas el influo de la Anglosaksaj invadintoj sur la keltajn procesiojn. Laŭ tiu skolo la dancantoj ricevis la nomon *maŭro* pro tio, ke iam ili nigrigis la vizaĝon por kaŝi la identecon.

En la fruaj jaroj de la nuna jarcento iu Sinjoro Cecil Sharp multe laboris, unue notante la popoldancojn preskaŭ malaperintajn, kaj poste redonante ilin al la popolo. Ofte tia dancado portis ĉiujn signojn de reviviĝo, sed en la lastaj jaroj viroj, kiuj interesiĝis

pri la morisko starigis Moriskan Ringon, kaj de tiam pli kaj pli interrilatis kun la tradiciaj trupoj, kaj tio reciproke bone efikas.

Ni atingas la monaton septembro, kiam okazas en Abbots Bromley, urbo en la graflando Staffordshire, la "Korna Danco", danco tre interesa al folkloristoj. Ses viroj portas boacajn kornarojn, akompanate de muzikisto, viro-virino, stultulo, virĉevaleta, arkpafisto kaj knabo, kiu muzikas je "triangulo". La dancantoj formas unu vicon kaj sekvas ringoforman vojon, sed de tempo al tempo ili formas du vicojn kaj kvazaŭ interbatalas. Kiam la kornaroj ne estas uzataj ili restas en la preĝejo. Pri la origino de la danco folkloristoj ankoraŭ disputas. Iuj vidas en ĝi paganan ceremonion, aliaj solenon pri la cedo de arbaraj rajtoj al la urbanoj en la jaro 1125.

En diversaj partoj de Anglujo je Kristnasko oni ankoraŭ ludas dramon

en kiu oni "mortigas" viktimon kaj poste lin revivigas. Ĉi tio eksterdube estas restaĵo de rito en kiu oni simbole revivigas la mortantan jaron. En norda Anglujo esenca parto de la prezentaĵo iam estis danco. Ĝin faris ses aŭ ok viroj kun glavoj. Dum la paso de la tempo la danco disiĝis de la dramo mem kaj ankoraŭ vigle vivas. La tereno de la glavdanco estas tiu iam okupita de la Danaj invadintoj, kaj iuj folkloristoj kredas, ke la Danoj alportis la dancon al Anglujo. Tiu dancformo certe troviĝas en Eŭropo, sed en nenia alia Angla regiono.

Pri ceremoniaj dancoj Anglujo ankoraŭ estas relative riĉa. Ke tiuj kaj la komunaj dancoj preskaŭ malaperis, ne estas mirige. Mirige estas, ke pro la tre frua industriiigo ia ajn popoldanco restis.

Ni deziras esprimi nian dankon al la *English Folk Dance and Song Society* (Angla Popoldanca kaj Popolkanta Societo) pro helpo rilate al la akiro de taŭgaj fotoj.



(foto : Reece Winstone)

La Korna Danco de Abbots Bromley

Nia Membraro

GIS 1951 ni regule donis al niaj membroj informon pri la membraro en la diversaj landoj en la unua parto de la jarlibro, sed la aranĝo eldoni la jarlibron en januaro malebligis la daŭrigon de tiu utila kutimo. Tiun statistikon por 1950

ni donis en la *dua* parto de la jarlibro 1951, sed el multaj landoj ni ricevis petojn por pli frua aperigo de tiu informo. Ni do nun donas ĝin en la gazeto por kontentigi tiun peton, kaj represos ĝin en la duan parton de la jarlibro por ke ĝi estu en pli konservebla formo.

Membroj de U.E.A. je la 31a de Decembro 1951

		AM	MJ	MA	MS	Pat.	DM	HM	Sumo
Acoroj	—	—	5	—	—	—	—	—	5
Alĝerio	—	1	1	1	—	—	—	—	3
Andoro	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Angolo	—	—	11	—	—	—	—	—	11
Argentino	—	1	59	3	—	2	—	—	65
Aŭstralio	—	5	68	5	1	11	—	—	90
Aŭstrujo	137	14	70	3	—	1	2	—	227
Belgujo	490	14	157	9	1	5	1	—	677
Bermudo	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Borneo	—	—	1	—	—	1	—	—	2
Brazilo	711	86	277	39	1	11	1	—	1126
Britujo	940	196	795	107	11	77	5	—	2131
Bulgarujo	—	—	2	—	—	1	1	—	4
Cipro	—	—	1	1	—	—	—	—	2
Ĉeĥoslovakujo	—	1	62	—	—	3	6	—	72
Ĉilio	—	—	3	—	—	—	—	—	3
Ĉinujo	—	1	7	1	—	1	—	—	10
Danlando	1020	27	152	1	—	1	1	—	1202
Egiptujo	—	4	11	—	—	3	—	—	18
Ekvadoro	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Etiopio	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Finnlando	—	64	237	—	—	1	1	—	303
Fr. Ekv. Afriko	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Fr. Okc. Afriko	—	—	1	1	—	—	—	—	2
Francujo	1068	87	373	17	1	17	10	—	1573
Germanujo	—	35	301	5	—	8	3	—	352
Grekujo	—	—	3	—	—	—	1	—	4
Gvatemalo	—	—	2	—	—	—	—	—	2
Hindoĉinujo	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Hindujo	—	2	1	—	—	1	—	—	4
Hispanujo	230	5	107	3	—	6	1	—	352
Hongkongo	—	—	3	—	—	—	—	—	3
Hungarujo	—	—	50	—	—	—	3	—	53
Indonezio	—	—	5	—	—	—	—	—	5
Irako	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Irano	—	—	—	—	—	2	—	—	2
Irlando	—	10	13	1	—	—	—	—	24
Islando	—	3	33	1	—	3	—	—	40
Italujo	400	27	163	4	—	3	1	—	598
Izraelo	—	—	36	—	—	1	—	—	37
Jamajko	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Japanujo	—	19	84	—	—	—	1	—	104
Jugoslavujo	650	3	52	1	—	2	1	—	709

	AM	MJ	MA	MS	Pat.	DM	HM	Sumo
Kameruno	—	—	1	—	—	—	—	1
Kanado	—	2	19	2	—	4	—	27
Kanariaj Insuloj	—	—	7	—	—	1	—	8
Kenjo	—	—	1	1	—	1	—	3
Kolombio	—	—	1	1	—	—	—	2
Kongo	—	—	3	—	—	—	—	3
Koreujo	—	—	2	—	—	—	—	2
Kubo	—	—	13	1	—	1	—	15
Liĥtenstejno	—	—	1	—	—	—	—	1
Luksemburgo	—	1	2	—	—	—	—	3
Madagaskaro	—	—	3	—	—	—	—	3
Madejro	—	—	9	—	—	—	—	9
Malajo	—	—	1	—	—	—	—	1
Maroko	—	32	28	5	—	3	1	69
Meksikio	—	—	3	—	—	—	—	3
Ned. Antiloj	—	—	1	—	—	—	—	1
Nederlando	623	46	384	10	1	6	4	1074
Nigerio	—	1	3	—	—	—	—	4
Norvegujo	615	15	98	4	—	5	1	738
Nova Kaledonio	—	—	1	—	—	—	—	1
Nov-Zelando	50	25	55	1	—	7	—	138
Ora Bordo	—	1	—	—	—	—	—	1
Pollando	—	1	48	1	—	1	2	53
Portugalujo	—	3	76	4	—	4	3	90
Rodezio	—	—	2	—	—	1	—	3
Rumanujo	—	—	1	—	—	—	1	2
Sarlando	—	—	9	—	—	1	—	10
Siamo	—	—	—	1	—	—	—	1
Sieraleono	—	—	—	1	—	—	—	1
Sovetunio	—	1	—	—	—	—	—	1
Sud-Afriko	—	1	29	1	—	1	—	32
Sudano	—	—	1	—	—	—	—	1
Svedujo	1286	91	320	19	—	15	3	1734
Svislando	140	50	95	9	—	28	3	325
Trinidado	—	—	1	—	—	—	—	1
Turkujo	—	—	6	—	—	—	—	6
Ugando	—	—	—	1	—	—	—	1
Urugvajo	—	1	26	—	—	1	—	28
Usono	489	26	151	21	—	17	2	706
Venezuelo	—	—	18	—	—	—	—	18
83 landoj	8849	903	4572	286	16	258	59	14943

SPIRITAJ EKZERCADOJ de Sankta Ignacio de Loyola

208-paĝa libreto, 13×9 cm., bele presita

1ŝ. 9p., aŭ 5 int. respondkuponoj ĉe

U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

3 steloj (oni aldonu sendkoston) ĉe

Hispana Esperanto-Federacio, Ruzafa 7, Valencia.

Ŝajnas oportune nun doni resuman statistikon pri la lastaj kelkaj jaroj, ĉar tio povas esti vere instrua; jen la ciferoj por 15 jaroj:

	*AM	*MJ	*Aliaj IM	Sumo
1937	10790	1192	1505	13487
1938	9983	1433	1624	13040
1939	8353	1474	1669	11496
1940	2161	810	1278	4249
1941	2749	592	781	4122
1942	2702	623	864	4189
1943	3063	667	1129	4859
1944	3178	746	1462	5386
1945	4675	1061	2530	8266
1946	9950	1131	4679	15760
1947	8995	1164	5846	16005
1948	11587	985	5135	17707
1949	12822	863	5064	18749
1950	8988	886	4837	14711
1951	8849	903	5191	14943

* A.M. = Asociaj Membroj are aligitaj de la Landaj Asocioj

* MJ = Membro kun jarlibro (sen la gazeto)

* Aliaj IM = Aliaj Individuaj Membroj, kiuj ricevas jarlibron kaj gazeton.

La jaroj 1946–7 montras la rapidan refluan post la jaroj de la milito, kaj tiutempe ni antaŭvidis rapidan kaj regulan progreson. Sed venis la tempo de registaraj dekretoj, kiuj malhelpis ke ni ricevu pagojn, ĉar en multaj landoj mankis devizoj; efektive en 1947 ni akceptis pli ol 2000 membrojn al kiuj ni sendis la jarlibron kaj gazeton kaj por kiuj ni ne sukcesis ricevi ian pagon. Tio grave endanĝerigis la vivon de nia Asocio kaj ni estis devigitaj fari decidon ne akcepti membrojn en la nepagokapablaj landoj. Tamen, danke al la sistemo de “adoptado” multaj membroj en pli bonstataj landoj malfortigis la baton por kelkaj centoj da membroj.

La vivoforto de nia Asocio estas la individuaj membroj kaj en 1951 ties nombro ree komencis kreski. Sed alvenis nova bato, kiu preskaŭ renversigis nian budĝeton—la granda

plialtiĝo en la kosto de papero kaj presado—plialtiĝo inter 50% kaj 100%. Kiel jam kelkfoje klarigita en la gazeto, la Komitato decidis en la Munkena Kongreso plialtigi la kotizojn konforme al la nova situacio, fidante al la daŭra subteno de niaj kunlaborantoj. Tiu fido ne estis vana. Kotizoj en la nuna jaro tre bone envenas, kiel montras la jena tabelo pri la **Internacia Konkursio 1952**.


Stato je 29 februaro 1952

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Izraelo ..	350	485	138.5
2.	Urugvajo ..	250	215	86.0
3.	Germanujo ..	3200	2605	81.4
4.	Svislando ..	1400	1115	79.6
5.	Japanujo ..	900	710	78.8
6.	Danlando ..	2700	2060	76.3
7.	Belgujo ..	2300	1692	73.5
8.	Finnlando ..	2600	1870	71.9
9.	Sud-Afriko ..	300	210	70.0
10.	Francujo ..	5500	3659	66.5
11.	Usono ..	2500	1654	66.1
12.	Maroko ..	500	330	66.0
13.	Britujo ..	12000	7774	64.8
14.	Norvegujo ..	1700	1095	64.4
15.	Kanado ..	250	160	64.0
16.	Nederlando ..	4800	3065	63.8
17.	Svedlando ..	5200	3040	58.5
18.	Portugalujo ..	800	460	57.5
19.	Hispanujo ..	1300	740	56.9
20.	Italujo ..	2200	1220	55.5
21.	Islando ..	400	210	52.5
22.	Aŭstralio ..	850	405	47.6
23.	Kubo ..	250	115	46.0
24.	Nov-Zelando ..	800	355	44.4
25.	Aŭstrujo ..	1000	320	32.0
26.	Brazilo ..	4500	1350	30.0
27.	Irlando ..	250	75	30.0

Tiu tabelo montras multajn grandajn ŝangojn kompare kun la rezultoj ĝis antaŭ monato, kaj la fruaj tagoj de marto montris tiajn bonajn enfluojn, ke ni estas certaj ke multaj landoj atingos la kvotojn. La kunlaborado de ĉiu membro povus certigi pli bonan finon ol iam antaŭe.

C.C.G.

Enigma Konkurso N-ro 67



Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkupono internacia.

Solvoj de la enigmoj en konkurso N-ro 65.

N-ro 143 : Amiko estas kara, sed vero pli kara. arkaika - metriko - intajlo - kalkano - orkideo - epilogo - sceptro - tumoroj - agariko - silenti - korveto - avideco - recenzi - asesoro.

N-ro 144 : Almozpetanto sinĝena restas kun sako malplena. Apud plena manĝotablo ĉiu estas tre afabla. Dentoj mordas la langon, tamen ambaŭ sin amas. Dronanto domon proponas, savito eĉ brikon ne donas. Se mi scius, kion mi ne scias, ĉiuj saĝuloj min envidus.

N-ro 145 : Longa konsidero savas de sufero. akvilegio - diplomato - sekundara - silogismo - toreadoro - katakombo - psikologo - palankeno - teleskopo - vermifugo - standardo - travestii - teokratio - prototipo - peristilo - paliativo - lingvisto - oligarkio - antisepsa - paradigmo - prozelito - baroskopio - tribunalo - periferio - septembro - tuberkulo - petromizo. (2 preseraroj: "osk" mankis; 16. Kolor- devis esti : Dolor-).

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 63-a konkurso: S-ro F. O. Bevan (Brit.) 174, S-ro V. Marccone (Ital.) 174, S-ro P. Brunet (Franc.) 171 p.

Enigmo N-ro 148. Ŝercdemandoj:

1. Kiu dento estas de neniu ŝatata?
2. Kiu fero pezas malpli ol papero?

3. Kiu kardo ne havas dornojn?
4. Kiu bato de infanoj estas ŝatata?
5. Kiu bardo ne kantas?
6. Kiu lanco ne estas ĵetata?
7. Kiu lano kantas?
8. Kiu rato estas privilegiita?
9. Kiu duo neniam estas duo?
10. Kiu melo estas manĝata?

Enigmo N-ro 149 : Ĉi-sube dek esprimoj el la proverbaro de D-ro Zamenhof, el kiuj mi alterne forlasis la vokalojn kaj la konsonantojn. Klopodu retrovi ilin.

1.—. NFR . MD . NV . Z . NN . Ŝ . V . L . N . Z . N ; 2.—E . . U . O . A . . . A . . A , . O . . . A . . E . . A . A . . E , . . A . O . A . . A . O . . O . . . A . I . A . . ; 3.—. LP . S . D . NT . D . M . T . . M . NK . SN . N . . ; 4.—. I . O . O . A , . IO . O . A ; 5.—B . N . . ST . SD . M . N . V . K . J . M . K . M . LN . V . ; 6.—I . . E . . A . . I . . U . O . . E . A . . A . . . A . U . O . ; 7.—. K . Z . NK . PT . Ĉ . L' K . P . , Ĉ . RL . V . ST . . ST . SG L . T . ; 8.—. IA . . A . O . . O . E . A . . A . U . O . . E . . E . A . ; 9.—. LD . M . LB . N . JPL . M . LGR . ND . N . L . KT . ; 10.—. A . O . O . A . . A . IE . . O . O . . U . A . A . . O . E . . O —

Enigmo N-ro 150 : Plenigu la figuron de la krucvortenigmo en la marta numero per la vortoj: aero - afiŝi - aloo - ankri - antaŭ - ardeo - balai - edifa - freŝa - ideo - kies - laste - naŭe - nenie - obei - okra - plue - prezo - riska - super.

J. Régulo Pérez :

Hidalgo

Studaĵo pri vorthistorio

LONGAN tempon oni kredis, ke la fonetiko kaj la morfologio estas la sola “scienca” en la lingvistiko, dum la literaturo kaj eĉ la sintakso estis margenaj aŭ komplementaj elvolvaĵoj. Hodiaŭ oni scias, ke lingvoj estas tutaĵoj, en kiujn miksiĝas tutaĵoj da vivo, da humaneco, tre malsamaj de tiuj de la mondo, kiun esploras la fiziko. Lingvaj problemoj estas preter la manipulaĵoj de la tiel nomata historia gramatiko, kiu estas pli historio pri krustoj, ol pri kerno de lingvo.

Tipa ekzemplo pri tiu aserto estas *hidalgo*, vorto romida laŭ sia aspekto kaj islama laŭ sia semantika funkcio. Tiu vorto estas unu el tiuj kaŝformismoj, kiuj funde erarigas lingvistikajn pozitivistojn. Kontraŭ tiaj eraroj reagis la idealista skolo, kiu siavice falis en la malan ekstremon, pro nesufiĉa atento pri la “fizika” flanko. Hodiaŭ, kvazaŭ kohera kuniĝo de la ekstremaj skoloj pozitivistaj kaj idealistaj, oni studas lingvojn kiel homan aktivecon, kiel socian fakton, kio naskis sciencan esplormetodon, kiun oni nomas sociologia skolo.

La neologismo *hidalgo* estas jam kvazaŭ indiĝeno en Esperantujo. Ĝi havas literaturan uzon (ekzemple, inter aliaj, ĉe la mortinta akademiano V. Inglada Ors) kaj troviĝas registrita en vortaroj (ekz-e ĉe Wüster). Certe *hidalgo* fariĝos nemalhavebla termino en Esperanto, ĉar por ĝi pledas ĝia vasta internacieco, kaŭzita de la fakto, ke ĝian signifon oni ne povas precize redoni per ordinariaj leksikologiaj rimedoj de aliaj lingvoj. Tio ŝuldiĝas al la fakto, ke ĝi estas

tipe iberia produktaĵo, socia institucio, kiu en literatura migro transiris la duoninsulajn landlimojn, precipe danke al tio, ke la protagonisto de la ĉefverko de la tutmonda rakonta literaturo, *Don Kihoto*, estas “hidalgo”. Sekve, sub sia hispana formo ĝi eniris la lingvojn anglan, bulgaran, ĉeĥan, francan, finnan, germanan, (nov)-helenan, italan, polan, rusan, svedan k.t.p.* Pro tio, mi kredis oportuna klarigi la estiĝon de tiu vorto, penante samtempe fari integran vorthistorian studon kaj, per lumigo de la signifo de *hidalgo*, plenpravigi ĝian finadopton fare de Esperanto.†

*Mi faris la konstaton demandante plurajn kompetentajn samideanojn surbaze de la titolo de la Cervantesa ĉefverko *El ingenioso hidalgo don Quijote la Mancha*, kun peto pri retraduko en Esperanton de la nacilingva vorto responde al la hispana *hidalgo* : nenie troviĝas eĉ proksimuma responda termino. Tamen la vorto *hidalgo*, ortografie senŝanĝa, troviĝas en la vortaroj de la lingvoj angla, ĉeĥa, finna, franca, germana, hungara, itala, pola, sveda k.t.p. En la hispana lingvo ĝia prononco estas *idálgo* ; sed ŝajne la plimulto de la eŭropaj lingvoj, kies *h* havas la elparolon de la Esperanta *h*, donis al la hispana (*h*)*idalgo* komencan sonon, kiun origine ĝi ne havas. Tiel oni povas ekspliki la bulgaran *hidalgo*, ĉar la bulgara ne havas la fenomenon *h*, kaj la rusajn *gidalgjo* aŭ *hidalgjo*, ĉar ankaŭ la rusa ne uzas *h*. Kontraŭe la novhelenaj transskribas ĝin ĝuste : *idalgós*, krom la dislokigo de la akcento.

Interese estas konstati, ke, ekzemple, la eminenta ĉeĥa poeto J. Vrchlichy verse uzis la vorton *hidalgo*, nome :

a mečem mával jako hidalgo

kiu signifas : “kaj ŝvingis glavon kiel hidalgo”, dum hungaroj havas flugantan sentencon, kiu entenas ankaŭ *hidalgo* : “Fiera kiel hidalgo”, kie *hidalgo* konsciigas al hungara uzanto iaspecan rangfieron.

† Ĉi tiun artikolon mi unue pensis kaj

La vorto *hidalgo* ekokupis mian atenton, kiam mi intencis traduki ĝin en Esperanton tial, ke ĝi troviĝas en la titolo de la ĉefverko de Miguel de Cervantes, *El ingenioso hidalgo don Quijote de la Mancha*, kiu jam plurfoje tradukincite ektentis min. Aliajn fojojn mi jam indikis ion pri ĝiaj signifo kaj neceso, sed nur pretere.

Kiam mi serĉis formalan kaj semantikan ekvivalenton por la vorto *hidalgo*, surprize mi trovis, ke nenio en la romanidaj lingvoj, krom *fidalgo* en la portugala, respondas al ĝi. Mi trovis, krome, ke la koncepto kaj sentimento pri *hidalgeco* estas radikale iberiaj. Tiam mi turnis min al fakaj libroj pri historio de hispanaj vortoj, kaj mi povis konstati, ke ĉiuj plenkonsente kaj senhezite asignas al tiu vorto la latinajn bazojn *filium* plus *de* plus *aliquod*, jene: *filium de aliquod* = *fijo d'algo* = *fijodalgo* = *hidalgo*, laŭ la lingva procezo de alglua kuntiriĝo pro fonetika eluzo.

Frapis min la fakto, ke ne estis klara la procezo pri la semantika ŝanĝiĝo de “filo de io”, laŭ la tradicia etimologio, al “nobelo”, ĝia fakta signifo. Tiam mi ekserĉis ĝian signifon inter la unuaj monumentoj de la skriba hispana lingvo. Helpe de la verkoj de Menéndez Pidal, la plej granda hispana mezepokisto, mi sciis, ke la vorto, laŭforme kaj laŭenhave, jam estis uzata dum la X-a jarcento, por difini iujn nobelojn, kiuj ĉeestas kristanajn reĝajn kortegojn. Menéndez Pidal donas ankaŭ

aranĝis por faka revuo; tial mi dokumentis ĝin amplekse kun tekstoj hispanaj kaj portugalaĵaj kaj detalaj fonetikaj konsideroj, ĉio zorge apogita je bibliografiaj citoj. Decidinte aperigi ĝin en *Esperanto*, mi devis ĝin mallongigi je triono kaj forstreki ĉiujn tekstocitojn, fonetikajn rezonojn kaj bibliografiajn notojn. Pro tio ĝi iom perdis de sia fakeca aranĝo, kion certe ŝatos la vasta legantaro de *Esperanto*.

valoregan tekston de la jaro 985 kun traduko latina de *hidalgo*: “filii bene natorum”. Laŭ tiu sama aŭtoro, *hidalgo* estas ano de la malplej supera nobela klaso. Tiel do dum mezepoko *hidalgo* estas “homo laŭdevene libera, kiu nek pagis impostojn nek faris iun ajn laboron”.

Nu, nenia nobela titolo en la eŭropaj lingvoj, laŭ mia scio, enhavas la vorton “filo”. Nenie, krom en la hispana kaj portugala, tio okazas. Eble se filologoj kaj lingvistoj ne estus estintaj sub la psiĥa premo, ke la hispana kaj la portugala estas fundamente latinidaj lingvoj—kaj sekve sub la timo mise islamigi ties elementojn—certe ili estus vidintaj, ke *hidalgo* devas esti respondejo de araba esprimo.

Deirpunkto estas la evidento, ke la eroj kiuj konsistigas la vorton *hidalgo* havas inter si rilaton neakordigeblan kun la naturo kaj la vortfarado de la romanidaj lingvoj. La romanidaj lingvoj esprimas patran-filan kunligon ne metante en ĝi la ideon, ke patro transigas sian intiman manieron en la naturon de filo. *Lóp-ez* signifas, ke iu estas filo de Lope, “Lopido,” sed ne, ke li estas “lopigita”; simile, kiam temas pri familiaj nomoj en keltaj aŭ ĝermanaj lingvoj: *Jakobsen* estas filo de Jakob, “Jakobido” sed ne “jakobigito”. Sed kiam arabo nomas rabiston “filo de la nokto” li faras el li noktan estulon.

Kontribuo de la araba kulturo al la iberia estas pli vasta, ampleksa kaj profunda, ol oni kredis ĝis nun. Tion plej brile kaj erudicie pruvis Américo Castro en sia gravega verko *Espana en su historia. Cristianos, moros y judíos*, Buenos Aires, 1948, kiun mi sekvas plurloke, kaj foje, ĉe trafaj esprimoj, eĉ preskaŭ laŭlitere. Miloj da arabaj vortoj troviĝas en la

hispana kaj portugala lingvoj, kiel sekvo de neekskuzeblaj bezonoj, simile kiel la lingvo latina devis akcepti milojn da helenaj vortoj. La gramatika strukturo de la iberiaj lingvoj ne estis esence modifita de la araba, ĉar la latin-latinida skriba tradicio ne tute elruiniĝis, sed ree ekkreskis kaj firmiĝadis laŭ ekiro kaj progreso de la rekonkero. Se la tuta iberia duoninsulo estus plene surkovrita de la araba invado, certe la lingva strukturo estus profunde aliigita, kiel okazis ekzemple al la angloj, kiam la normandoj devige trudis al ili sian lingvon kiel mastroj kaj sinjoroj. La normandismoj de la angla lingvo estas plejparte sekvo de trudo, dum la arabismoj de la iberiaj

lingvoj estas sekvo de nerezistebla importado de aĵoj, rezulto de produktaj kapabloj, kiuj mirigis pro sia supero. Tiuj leksikonaĵaj importoj kaj adaptoj temas pri ĉiuj sferoj de la vivo: kamparkultivo, arkitekturo, artoj kaj metioj, komerco, publika mastrumado, sciencoj, milito k.t.p.

Nu, kiam oni konsideras tiujn faktojn kaj oni senigas sin de la kontraŭislama antaŭjuĝo, *hidalgo* aperas tia, kia ĝi ja estas: kiel unu el tiom da formoj; per kiuj oni karakterizas personon surbaze de ties magia transcendo. Laŭ la araba koncepto, homo povas esti ido, filo de ĉio, kio lin ĉirkaŭas. Jen kelkaj porkomparaj ekzemploj:

<i>araba vorto</i>		<i>laŭlitera traduko</i>		<i>signifo</i>
ibn ad-dunyā	..	filo de la mondo	..	riĉulo
ibn al-layl	..	filo de la nokto	..	rabisto
ibn al-ayyām	..	filo de la tagoj	..	spertulo
ibn ĥurr	..	filo libera	..	honorulo
ibn āwādim	..	filo de bonedukitoj	..	bonmorulo
ibn ĥarb	..	filo de la lukto	..	militisto

Hispanaj maŭroj nomis *beni-Gómez* la idojn de pra-Gómez; *beni-Alfonso*, la reĝojn kaj reĝan familion de Leonlando; *beni-Fernando*, la idaron de la kastilaj grafoj, k.t.p. Ĉi-okaze la nomon *beni* sekvas nomo de persono; sed ĉe unu okazo oni trovas komunan nomon: *beni-l-ajmas*, laŭliterare “filoj de la kvinono”; *ajmas* estas pluralo de *joms*, kiu signifas “teroj en la konkeritaj landoj, kiuj iĝis propraĵo de la ŝtato”, institucio, kiun iniciatis korana ordono (VIII, 41), laŭ kiu, el ĉiuj militakiraĵoj kvinono apartenas al Dio kaj al ties Profeto.

Ĉar Iberio estis milita predo,* kvinono de ĝia tero estis destinita al la celoj difinitaj en la Korano. Kiuj

ekspluatis la *joms* kaj ties idoj, tiujn oni nomis *beni-l-ajmas*. Laŭ la historiisto Mahammed Ibn-Mozaim, kiu vivis en la XI-a jarcento, Mūsā-ibn-Nuṣayr, kiu invadis Iberion en la jaro 712, “deklaris ŝtata propraĵo la kvinonon de la konkeritaj landoj” kaj asignis al la landidoj kultivon de tiuj terenoj, kun ŝarĝo kontribui al la fisko per triono de la terproduktoj. La citita historiisto diras, ke la unuajn kultivistojn “oni nomis *ajmas*, kaj ties idojn *beni-l-ajmas*”. Tiel estiĝis privilegia klaso—sur privilegia tero, destinita al spiritaj celoj—kiu dependis de la Ŝtato kaj samtempe ĝuis ĝian protekton kaj ŝirmon. Singularo de *beni-l-ajmas* estas *ibn al-joms* “filo de la kvinono”.


* predo = militakiraĵo, rabaĵo.

Nun ni esploru la signifon de *hijo de algo* = *hijodalgo* = *hidalgo*. En la esprimo *hijo de algo*, *algo* ne povas reprezenti la latinan *aliquod*, ĉar estas nekompreneble, kiamaniere el la nedifinita *aliquod* = *algo* povis eliri la plursignifeco de la *algo* de *hijo de algo*.

La vorto *algo* havas jam en la antikvaj hispana kaj portugala lingvoj konkretajn signifojn, kiuj ne povas veni de la nedifinita *aliquod*, inter aliaj, tiujn de “bonaj agoj”, “donoj” k.t.p.; *hidalgo* sekve oni povas klarigi kiel “filo de bonoj, de bonaj agoj, de donoj”, kio koincidas kun la latina traduko de la X-a jarcento: “*fili bene natorum*” = “filoj de indaj naskitoj.” Sed kune *algo* signifas “materiajn posedaĵojn, riĉaĵojn”, hispane kaj portugale.

Mezepoke oni parolis pri *fili nobilium*, *fili primatum*; sed tiuj vortoj ne estigis kunmeton kun signifo “nobeligito”, “nobelo”. Ĉe *hidalgo*, *algo* metas sian esencon (kia ajn ĝi estu) en *hi[jo]* kaj el ambaŭ eliras kunmetaĵo, en kiu la nocioj pri *hijo* kaj *algo* fornebuliĝis; la rezulto estas “nobelo” ne “filo”. Ĉe la esprimoj *fili nobilium*, *fili primatum* ambaŭ vortoj retenas sian substantiv-econ, kongrue al la okcidenta naturo de la lingvo.

Ne taŭgas do la latina *aliquod*, kiu klarigas nenion. Tial necesas pensi, ke *algo* povus esti aliformiĝo, kaŝformismo de araba vorto, kiu signifus samtempe “ion, riĉon, bonajn agojn”. Sed ŝajne tiu araba vorto ne ekzistas. Ne restas alia vojo ol



La Alhambra, unu el la vidindaĵoj de Hispanujo, konstruita de la araboj en la 12-a kaj 13-a jarcentoj.

rilatigi tiun *algo* kun *al-joms*; *al-joms* “la kvinono”, “la posedaĵoj destinitaj al publikaj kaj bonfaraj celoj” estis institucio, kies servo estis privilegio. Certe do estis diferenco inter la administrantoj de tiuj posedaĵoj—antaŭ ĉio sanktaj—kaj la farmistoj kaj administrantoj de privataj posedaĵoj. Kaj kiel la nokto verŝas sian nigron sur la rabiston, tiel ankaŭ certe la sankta institucio *al-joms* verŝis iajn bonajn ecojn kaj virtojn sur tiujn, kiuj gardis por si du trionojn el tio, kion tiaj teroj produktis.

Pruvo, ke *al-joms* havis grandan prestiĝon inter la kristanoj, estas la fakto, ke la hispanaj reĝoj adoptis la institucion de la “kvinono”, unue kiel kvinonon de la militakiraĵoj, kaj poste kiel kvinonon de la riĉaĵoj de la Hispanaj Indioj (=Ameriko). Kiuj prenis la kvinonojn por la reĝo estis homoj de konataj altaj virtoj, meritoj kaj sinjoreco. Tiu institucio de la kvinono de la terproduktoj por la fisko transmigris al Ameriko, kiel dirite, kaj konserviĝis ĝis hodiaŭ en Kanarioj, kien importis ĝin la hispanaj kaj portugalaj konkerintoj, dum la XV-a jarcento; hodiaŭ ĝi estas, nur ĉe kamparo, arĥaika postrestaĵo de iuj kanariaj komunumoj; tie la komunumoj luas ties impostprenon al privatuloj favore al la komunkaso.

La transiro de *al-joms* al *algo* estas fonetike ebla en la kastila lingvo. Jen paralelaĵoj:

<i>araba vorto</i>	<i>traduko</i>	<i>hispana rezulto</i>
jalifa	kalifo	[al]galifa
jarrŭb	karobo	garroba
jayt	fadeno	guita

kaj tiel plu. Eble *al-joms* donis unue *aljóns* = *aljós* = *algós*; *al-joms* = hispana *algós* ŝanĝis poste, probable


sub influo de latina *aliquod*=hispana *algo*, la lokon de la akcento, pri kiu fenomeno ekzistas ekzemploj: portugala *Faro* venas de la malnovportugala *Fárom*, kiu siavice venas de la araba *harún* (nomo de persono).

* * *

Resume: *hidalgo* estas iberia adapto de araba esprimo, dokumentita jam dum la X-a jarcento, ĉar neblas ĝin klarigi kiel latinan aŭ latinidan vorton, kaj ĉefe ĉar en la mozaraba* Iberio ekzistis socia institucio kaj nomo, kiujn oni povas racie kaj kongrue rilatigi al ĝi. La socia klaso, kiu en la VIII-a jarcento estis ligita al la ekspluato de la *joms*—materia riĉo, spirita posedo—certe estis tiu, kiu poste administris la posedaĵojn de la ŝtata trezorejo, la fiskon, kaj sekve ĝuis sufiĉan stabilon kaj bonvivon por iĝi privilegia klaso. El tio oni povas konkludi, ke se la korespondo inter *ibn al-joms* kaj *hidalgo* estas, kvankam tre verŝajna, kongrua kaj racia, nur hipoteza, estas ja nekontesteblaĵo, ke *hidalgo* prezentas — lingve kaj institucie — adapton, importon, inkruston de islama koncepto en la iberian kulturon.

Tiu vorto kaj institucio vastigis sian sencon kaj fariĝis etikedo de pure iberia koncepto, kiu troviĝas nenie en la cetera mondo. Tiu unikeco, kaj la fakto, ke ĉiuj gravaj kulturlingvoj devis ĝin importi el la hispana pledas por ĝia adopto kiel komunlingva vorto en Esperanton.

* *mozarabo*=teĥnika termino kun la signifo “kristano, kiu vivis inter la hispanaj maŭroj dum la mezepoko (hispane *mozárabe*)”.



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.
Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=kurso, M=Muziko

Dimanĉo	18.00–18.15	Sofia. 39.11m. I. Radio Sofia, Bulgarujo.
Lundo	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
	18.00–18.30	Rabat. 482m. K (francilingve). Radio-Maroc, Rabat, Maroko.
	22.15–22.40	Hilversum, 298m. kaj 188m. I.M. (ĉiun duan lundon): V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Mardo	00.45–01.00	Bauru. 91m., 240m. K. I. Radio Bauru, Brazilo.
	07.45–08.00	Lille. 235m. K. I. Esperanto, 94 rue de la Rochelle, Tourcoing, (Nord), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG. Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	22.15–22.30	Gvatemalo. 49m. I. La Voz de Centro América, Guatemala Cd., C. Ameriko.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	17.30–17.50	Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vittorio Veneto 56.
	19.30–20.00	Madrid. 233m., 42.33m. P. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Ĵaŭdo	08.30–08.45	Paris. 348m. K.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel lunde. P. D-ro Privat.
Vendredo	17.30–17.50	Roma. Kiel merkrede.
	22.15–22.30	Hilversum. 402m. P. (nur la unuan vendredon de ĉiu monato). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
	22.30–23.00	Hilversum. Kiel lunde, sed ĉiusemajne. M.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	20.00–20.15	Sofia. 39.11m. I.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Belartaj Konkursoj 1951 : Teatraĵo Originala

La Amo ne konas Landlimojn

de F-ino E. de Burgh Daly

Unu-akta komedieto

Personaro.

S-ino Kent

S-ino Bark

Dora, plu juna filino de S-ino Kent

Bobi

Hugo, filo de S-ino Bark

Linda, pli aĝa filino de S-ino Kent

Kelnero

Scenejo : Salono en Svisa hotelo. S-ino Kent, mezaĝa, sidas sur kanapo kaj brodas. S-ino Bark, ankaŭ mezaĝa, sidas en brakseĝo kaj ludas "Paciencon". Ŝi ĵus finis unu ludon kaj ŝi kunkolektas la ludkartojn por rekomenci.

S-ino Bark. Estas jam la sesa. Baldaŭ la gejunuloj revenos.

S-ino Kent. Feliĉe. Kiel enuige estas en la hotelo sen ili ! Mia filineto estis jam for frumatene.

S-ino Bark. Ankaŭ mia filo. Estas sinsekve ke kie estas via Dora, tie ankaŭ estas mia Hugo.

S-ino Kent (sen entuziasmo). Kompreneble. En juneco oni facile amikiĝas. Dora estas nur dek sep-jara. Cetere la societo en la hotelo estas tre miksitaj. Via filo kaj la junulo kiun ili nomas Bobi estas la solaj anglaj junuloj.

S-ino Bark. Bobi ne estas Anglo.

S-ino Kent. Nu bone, Amerikano. Estas tiel same. Li parolas preskaŭ sen amerika akcento. Liaj manieroj estas tiuj de perfekta angla *gentleman* ; ili povus servi kiel modelo por iuj Angloj kiuj vojaĝas fremdlanden. (Paŭzo) Se mi estus sciinta antaŭe ke la gastoj en la hotelo estas fremduloj mi ne venus.

Estis tute alie la lastan fojon kiam mi restadis en Iksdorf.

S-ino Bark. Ne estas do via unua vizito ?

S-ino Kent. Ne. Antaŭ kvin jaroj mi pasigis du monatojn ĉi tie kun miaj du filinetoj. Ili konservas la plej feliĉan memoron pri tiuj tagoj.

S-ino Bark. Vi havas duan filinon, do ?

S-ino Kent. Jes. Linda estas kvar jaroj pli aĝa ol Dora.

S-ino Bark. Jam edziniĝinta ?

S-ino Kent. Bedaŭrinde, jes.

S-ino Bark. Bedaŭrinde ? Ĉu ŝi edziniĝis kontraŭ via deziro ?

S-ino Kent. Kontraŭ mia klare esprimita malpermeso.

S-ino Bark. Ĉu vere ?

S-ino Kent. Eĉ tro vere. Ŝi vojaĝis al Usono por pasigi ses monatojn ĉe geamikoj. Sep semajnojn poste ŝi skribis al mi, ke ŝi fianĉiniĝis kun ia fremdulo kaj ili intencas tuj geedziĝi. Kompreneble mi telegrafis mian absolutan malpermeson kaj ordonis al ŝi tuj reveni hejmen.

S-ino Bark. Ĉu !

S-ino Kent. Certe. Mi tute malaprobas edziniĝon kun fremdulo.

S-ino Bark. El kiu lando ?

S-ino Kent. Nu, mi ne bone memoras; sed ne gravas. Ĉiuj fremduloj estas barbaroj.

S-ino Bark (*sin detenas malfacile de ekrido*). Do via filino ne obeis al via ordono ke ŝi reiru hejmen?

S-ino Kent. Ne. Pasis du monatoj; tiam mi ricevis telegramon por anonci ke ŝi edziniĝis la tagon kiam ŝi fariĝis plenaĝa, kaj estas vojaĝonta Anglujon kun sia nov-edzo. Mi telegrafis responde, ke mi akceptos nek ŝian edzon nek ŝin mem. Por eviti malagrablojn mi decidis tuj vojaĝi kun Dora al Svisujo.

S-ino Bark. Kaj Dora? Kion pensas ŝi pri la afero?

S-ino Kent. Ŝi estas malbonhumora. Ŝi senĉese riproĉas min, ke mi apartigis ŝin de ŝia fratino. Dum la lastaj tagoj, tamen mi rimarkis, ke ŝi iom reprenis sian kutiman gajecon. Tio pravas, ke miaj klopodoj por ŝi estas saĝaj.

(*Ekstere bruego de junaj voĉoj. Aŭdiĝas: "Bon soir, Dora", "Ĝis revido, Bobi", "Auf Wiedersehen, Hugo", "Ĝis baldaŭ", k.t.p.*)

S-ino Bark. Jen alvenas la gejunuloj.

(*Eniras Dora, bela gaja knabino, sporte vestita. Sekvas Bobi, juna brunulo, tre elegante kaj laŭmode vestita per sporta vestaĵo; kaj Hugo, blonda alta malgracia junulo, malzorge vestita kun senordigitaj haroj. Hugo sidigas sin silente sur la brako de la seĝo kie sidas S-ino Bark. Bobi staras piede kaj faras elegantan kliniĝon al la sinjorinoj. Dora sin ĵetas apud sia patrino sur la kanapo kaj per knabosimila gesto ĉirkaŭbrakas kaj kisas ŝin.*)

Dora. Nu, patrino, ĉu vi bone kondukis dum mia foresto?

S-ino Kent (*ridetas kaj lukte liberigas sin de la premiga kareso*). Ho! karulino, lasu al mi nur iom da spiro! Ne necesas ke mi demandu ĉu vi guis vian ekskurson. (*Al Bobi*) Bonan tagon, Sinjoro—nu vere mi ne konas vian nomon.

Dora. Ne elparolebla, panjo, tute ne elparolebla. Nomu lin Bobi. Ĉiuj nomas lin Bobi. Ĉu ne, Bobi?

Bobi. Sinjorino Kent honoros min se ŝi bonvolos nomi min per mia kromnomo.

S-ino Kent (*tre afable*). Do, Sinjoro Bobi, sidiĝu, mi petas. Vi certe estas ĉiuj lacaj post via longa ekskurso.

Dora. Tute ne, patrino. Kaj vespere ni dancos en la granda halo. Ho! Se nur Linda povus esti kun ni!

S-ino Kent. Ne estu stulta, Dora.

Dora. Kiel stulta? Linda ĝuus ĉion eĉ pli ol mi.

S-ino Kent. Ne atentu, sinjoro, la kapricon de mia filineto. La lastan fojon kiam ni estis en Iksdorf mia pli aĝa filino estis kun ni. Nun Dora bedaŭras la foreston de sia fratino.

Bobi. Kompreneble.

Dora. Ho! Kian mirindan vidaĵon ni ĝuis de la montpinto! Ĉu ne, Hugo?

Hugo (*malbonhumore*). Ho jes. La vidaĵo ne estis malbela. (*Li elpoŝigas cigaredojn, metas cigaredon tra la lipoj kaj ekskrapas alumeton.*)

S-ino Bark. Petu permeson por fumi, knabo mia.

Hugo. Ho, ĉu malplaĉus al vi se mi fumus, S-ino Kent?

S-ino Kent (*malvarme*). Fumu libere se vi volas.

(Hugo proponas cigaredon al Dora, ekbruligas ĝin kaj restas apud ŝi.)

Bobi (al S-ino Kent). Kia bela brodaĵo, S-ino Kent! Kiom da pacienco vi bezonas por brodi tiajn delikatajn desegnaĵojn! Estas vera artaĵo.

S-ino Kent (tre flatita). Ho Sinjoro Bobi! Vi taksas tro alte mian humilan brodaĵon. Bedaŭrinde mi ne povas daŭrigi mian laboron. Pro ia malatento mi lasis hejme mian plej necesan brodsilkon. Mi estas tre ĝenata pro tio.

Dora. Ho panjo! Vi kiu estas tiel ordema! Se **mi** forgesas ion vi nomas min sencerba malzorgulino. Ĉu ne, patrineto?

(Ŝi pinĉetas la vizaĝon de S-ino Kent.)

S-ino Kent. Jes, mokadu, petolulino. Mi forgesis nenion, kiu povas ĝuindigi al **vi** la restadon en Svisujo.

(Kun kolera mieno ŝi rekomencas brodi.)

S-ino Bark (celante trankviligi ŝin). Eble vi povas aĉeti kion vi bezonas en la vilaĝa butikio.

S-ino Kent (incitite). Absolute ne eble.

Dora. Kial neeble? En tiu butiketo oni povas aĉeti tutan mondon da objektoj. Ĉu ne, Hugo?

Hugo. Mi scias, ke oni aĉetas tie botlaĉojn.

S-ino Kent. Dankon, Hugo. Mia silkfadeno estas iom pli delikata kaj malofta ol botlaĉoj.

Dora. Ellasu la rozkoloran fadenon, panjo, kaj daŭrigu per la blua. Vi havas sufiĉon da ĝi.

S-ino Kent (ĉiam pli incitite). Kaj difektu la tutan brodaĵon! Vi havas strangan ideon pri la valoro de mia laboraĵo.

Bobi. Se vi bonvolos konfidi al mi ekzempleron de via silkfadeno, mi iros morgaŭ matene al Berno por serĉi samspecaĵon.

S-ino Kent. Ho, Bobi, vi estas tro afabla! Mi ne povas permesi, ke vi tiel ĝenu vin por mi.

Bobi. Nenia ĝeno; estos plezuriga veturado, mi certigas vin. Permesu, ke mi rigardu. *(Ili kunparolas pri la silkaj fadenetoj.)*

Dora (al Hugo). Vi dancos hodiaŭ vespere, ĉu ne, Hugo?

Hugo. Ne.

Dora. Kial ne?

Hugo. Mi ne scipovas.

Dora. Ho, mi instruos vin. Estas tre facile.

Hugo. Mi ne dancos, mi ripetas.

Dora. Pro ĉielo! Kial ne?

Hugo. Ĉar vi nur dancos kun Bobi.

Dora. Ne estu malsaĝulo, Hugo. Mi vetas, ke Bobi eĉ ne rigardos miadirekten. Lasu min instrui al vi, bona knabo.

(Hugo reprenas sian bonhumoron. Ili kunparolas.)

Bobi (stariĝas). Mi traserĉos la tutan Bernon, S-ino Kent, ĝis kiam mi trovos la ĝustan nuancon. Mi petas permeson lasi vin.

(Li faras kliniĝon al la sinjorinoj kaj eliras.)

Dora (vokas al li dum li estas elironta). Ne forgesu la balon! *(al Hugo).* Nun mi donos al vi lecionon pri la fokstroto.

S-ino Bark (stariĝas). Ho, mi petas vin, Hugo. Mi bezonas vian helpon pri iu afero. Nur momenton, Dora. Tuj li revenos al vi. Vi venos kun mi, ĉu ne, Hugo?

Hugo. Ĉu vi atendos min, Dora ?

Dora. Jes, jes. Mi atendos.

(S-ino Bark kaj Hugo eliras.)

S-ino Kent. Kia junulaĉo !

Dora. Ne, patrino, ne. Hugo estas bona ulo.

S-ino Kent. Li estas malbonmaniera ursido. Kia kontrasto kun Bobi ! Bobi tiel elegante kondutas ! Kaj kian bonkorecon li elmontras !

Dora (ekscitite). Do, Bobi plaĉas al vi, panjo ?

S-ino Kent. Li estas ĉarma junulo ! Vidu, kiel kompleze li okupas sin pri la ĝenoj de mi, maljunulino ! Ĉu li ne ankaŭ plaĉas al vi, filineto ? Estas videble, ke li tre admiras vin.

Dora (sindetene). Ho jes, mi ŝatas lin. Ankaŭ Hugon mi ŝatas.

S-ino Kent. Hugo ! Li ne indas komparon kun Bobi. Oni vidas, ke Bobi kutimiĝas al bona societo. Sed vi, karulino, kial vi ĉiam hontigas min per viaj plendoj pri la foresto de Linda, kvazaŭ mi estas kulpa ? Vere la patrino sorto estas malĝoja. *(Ŝi ploremetas.)*

Dora (enbrakigas ŝin). Panjo kara, mi ne plu riproĉos vin. Nun mi estos bona knabino, vi vidos. *(Ili interkisas.)*

S-ino Kent. Ho, mia karulino ! *(Bobi eniras.)*

S-ino Kent. Nun mi iras vesti min por la vespermanĝo. Ĉu vi restos ?

Dora. Jes. Tro frue estas por fari tualeton.

(Bobi kavalire malfermas la pordon por S-ino Kent, kiu eliras. Bobi revenas kaj etendas la manojn al Dora.)

Bobi. Dora ! Mi ĝojas trovi vin sola. Mi havas bonan novaĵon !

Dora. Mi ankaŭ ! Bonan novaĵon, Bobi ! La patrino diris, ke vi plaĉas al ŝi !

Bobi. Bone ! Tio plifaciligas nian agadon. La tempo jam alvenas, kiam ni povas malkovri la veron.

Dora. Ne, ne Bobi ! Ni atendu ! La afero ne estas tiel simpla kiel vi kredas. La obstineco de mia patrino estas nekredebla. Ŝi ŝatas vin, sed ŝi ne scias, ke vi estas Sud-Amerikano. Ŝi kredas, ke vi estas Usonano. Por ŝi Kolombio estas sovaĝa lando.

(S-ino Bark eniras, nerimarkite. Ŝi hezitas apud la enirejo.)

Bobi (kaptas la manon al Dora). Ne gravas, Dora. Mi iros rekte al ŝi kaj mi diros malkaŝe : 'S-ino Kent, la amo ne konas landlimojn. Mi enamiĝis kun via adorinda filino je la unua vido, kaj ŝi—'

S-ino Bark (alproksimiĝas). Pardonu, mi lasis ĉi tie mansaketon.

Bobi. Permesu al mi.

(Li serĉas, trovas kaj donas la saketon al S-ino Bark, kiu dankas kaj eliras.)

Dora. Jen aĉaĵo ! Ŝi subaŭskultis, kaj rakontos ĉion al la patrino.

Bobi. Ho, mi kredas, ke ne. Jen kion mi diros, 'Bela patrino de pli bela filino—'

Dora. Bobi, via elokventeco neniel utilos. Ĝi sufiĉu por via advokata profesio. Vi jam faris bonan impreson, sed tio ne signifas, ke patrino akceptus vin kiel bofilon. Ni devas esti certaj pri tio, antaŭ ol ni malkovros al ŝi nian sekreton. Alimaniere ni fuŝos ĉion. Kara Bobi, promesu, ke vi nenion diros alla patrino ĝis mi donos al vi signalon.

Bobi (kisas ŝian manon). Mi obeas al vi, tiraneto.

Dora. Iru nun, kaj atendu min en la saloneto je la oka.

Bobi. Ĝis la oka.

(Li eliras. Hugo eniras nerimarkite. Dora postrigardas Bobi'n. Blovas mankison post li.)

Dora. Tio por—

Hugo. Dora! Al kiu vi kisas la manon?

Dora. Kiamaniere tio koncernas vin?

Hugo. Pardonu min, Dora. Mi ne rajtas demandi tion. Sed—ho Dora, mi ne plu povas deteni min. La tutan tagon mi serĉis okazon por paroli kun vi, sed ĉiam Bobi estis apud vi.

Dora. Kial ne? Kio malhelpis vin paroli antaŭ li? La parolo estas libera al ĉiuj.

Hugo. Ho, Dora, karulino, ne moku. Nur aŭskultu.

(Li kaptas ŝian manon kaj ŝi retiras ĝin.)

Dora. Mi ne aŭskultos. Faru vian lecionon, bona knabo, kaj ne estu babilema. Metu la piedojn tiel. Unu, du, tri.

(Ŝi kaptas lin per la brakoj kaj igas lin sekvi ŝiajn paŝojn. Unue li eraras, sed baldaŭ kaptas la ritmon. Ili malrapide dancas laŭ la amplekso de la scenejo.) Bone. Reen. Denove. Bona knabo, vi jam lernis. (Ili haltas. Hugo retenas en siaj ŝiajn manojn.)

Hugo. Dora, mi amas vin.

Dora. Vi **amas** min! Mi ne komprenas.

Hugo. Mi igos vin kompreni, Dora. Ĉiun tagon mi amas vin pli kaj pli. Eĉ unu momenton mi ne forgesas vin. Pro amo al vi mi ne dormas nokte, mi ne povas manĝi—

Dora. Ho! pro tio vi ne manĝis vian kokidporcionon dum la pikniko! Ĉar vi amas min!

Hugo. Mi amas vin pli ol mi povas esprimi. Dora, kara Dora, ĉu vi amas min iomete?

Dora. Ne. Mi manĝis vian kokidaĵon krom la mia. Tio pruvas, ke mi ne amas vin.

Hugo. Ne, ne, Dora, tio pruvas nenion. Nur respondu al unu demando, Dora. Ĉu vi amas alian personon.

Dora. Jes.

Hugo. Ho Ĉielo! Kiun vi amas?

Dora. Linda'n.

Hugo. Linda'n! Kiu estas Linda?

Dora. Linda estas mia fratino. Mi amas ŝin; kaj mi perdis ŝin, nur ĉar ŝi edziniĝis.

Hugo (vidas gaje). Do edziniĝu ankaŭ vi kaj vi egaliĝos. Kara, kara, Dora, ĉu vi edziniĝos kun mi?

Dora. Knabo, ne demandu tion. Geedziĝo estas serioza afero. Ni restu bonaj geamikoj. Estas pli amuze tiel, ĉu ne?

Hugo. Do, almenaŭ vi ne malŝatas min?

Dora. Ne, Hugo, mi tute ne malŝatas vin.

(Hugo kaptas ŝin por ekdancigi ŝin. Aŭdiĝas la voĉo de S-ino Bark ekstere: 'Hugo! Hugo! Kie vi estas? Venu!')

Dora. Aŭdu! Via patrino vokas vin. Iru tuj, bona knabo.

(Hugo faras nean geston. Ili baraktetas kaj Dora puŝas lin al la pordo.)

Hugo. Promesu, ke vi dancu kun mi vespere.

Dora. Kompreneble. Vi fariĝos mia reklam-lerninto.

(Hugo eliras. Dora sidiĝas pripenŝeme. S-ino Kent eniras, en vespera tuaŭeto.)

S-ino Kent. Kara filineto! Ĉu li proponis geedziĝon kun vi?

Dora. Jes, patrino.

S-ino Kent. Kaj vi? Ĉu vi akceptis lin?

Dora. Ne, patrino.

S-ino Kent. Ne! Kial ne? Ĉu vi ne amas lin?

Dora. Mi ne estas certa.

S-ino Kent. Karulino, vi estas tro juna por koni vian propran koron. Lasu al via patrino konigi ĝin al vi. Vi estimas lin, ĉu ne? Vi scias, ke li estas bona kaj honesta homo.

Dora. Ho jes. Li estas honesta. Li ja nenion ŝtelis de mi. Ĉu pro tio mi devus edzigi lin?

S-ino Kent. Formetu vian ŝercemon, Dora. Edziniĝo estas serioza afero.

Dora. Tro serioza, patrino. Li estas plej kara knabo en la mondo, sed mi estas tro juna por edziniĝi. Mi volas amuziĝi. Mi ĝojas, ke li plaĉas al vi. Ŝajnis al mi, ke vi malŝatas lin.

S-ino Kent. Kontraŭe. Vi tute miskomprenis min. Mia opinio Bobi estas vera ekzemplo de sinjoreco.

Dora. Bobi!

S-ino Kent. Mi povas diri, ke se mi mem devus elekti mian bofilon, mia elektito certe estus Bobi.

Dora. Patrino! (Ŝi ĵetas la brakojn ĉirkaŭ la kolon de sia patrino, kaj rondirigās sin ĉirkaŭ la scenejo. S-ino Bark eniras, kaj restas, embarāsita, ĉe la enirejo.) Ho, Sinjorino Bark! Venu! Patrino, diru al ŝi, kion vi ĵus diris al mi. Diru, diru.

S-ino Kent (ordigas siajn harojn kaj vestojn). Dora, kia knabulino vi estas. Mi diris al mia filineto, S-ino Bark, ke se mi devus elekti mian propran bofilon, mi certe elektus Bobi'n.

S-ino Bark. Sinjorino Kent, mi bedaŭras diri al vi, ke mi alportas malagrablan novaĵon.

Dora kaj S-ino Kent. Ho kion?

S-ino Bark. La fripono, kiu nomiĝas Bobi, estas jam edziĝinta...

S-ino Kent. Edziĝinta! Bobi edziĝinta! (Dora ekridas. S-ino Kent faletas kvazaŭ svene sur la kanapon.) Tio ne povas esti vera. Kiel vi sciis?

S-ino Bark. Li vojaĝas miellune kun sia novedzino.

S-ino Kent. Ne estas kredeble...

S-ino Bark. Mi interparolis kun lia Usona ŝoforo. Li diris, ke liaj gemastroj elŝipiĝis en Ĝenovo lastan semajnon kaj estis vojaĝontaj rekte al Anglujo kiam la sinjorino kaptis gripon. Ili tiam decidis veturi al Iksdorf kie ŝi iam pasigis libertempon. Ĝis hodiaŭ ŝi restis en la lito. Kiamaniere la novedzo pasigis la tempon, ni jam scias. Bela mielluno!

S-ino Kent. Ne povas esti! Dora, kial vi silentas?

S-ino Bark. Ŝi silentas pro honto. Dum ŝi flirte allogis mian filon, kaj igis lin pli kaj pli enamiĝinta pro ŝi, ŝi amindumis kun Bobi. Jes, fraŭlino, senutile nei. Ĵus vi koketis kun mia kompatinda Hugo, kaj nur kvaronhoron antaŭe mi vidis Bobi'n karesi vin, kaj nevole mi aŭdis tiujn vortojn, 'Mi diros al via patrino, ke mi enamiĝis kun ŝia filino je la unua vido.'

S-ino Kent. La senhontulo ! Sed Dora ne estas kulpa. Ŝi ne sciis, ke Bobi estas edziĝinta.

Dora. Jes, patrino. Mi ja sciis, ke li estas novedzo.

(Hugo eniras nerimarkite.)

S-ino Kent. Dora ! Ĉu vi estas freneza ? Vi ĵus diris al mi, ke li proponis edziĝon kun vi, ke li estas kara al vi, kaj vi malakceptis nur ĉar vi estas tro juna.

Dora. Jes, patrino. Mi ja diris tion, sed mi parolis pri Hugo.

S-ino Kent. Pri kiu ?

Dora. Pri Hugo.

Hugo. Dankon, Dora. *(Li kaptas ŝian manon, kiu restas en lia. Bobi, frake vestita, eniras.)*

Bobi. Ĉu mi altrudas min ?

S-ino Kent (stariĝas). Vi venas ĝustatempe, sinjoro, por klarigi vian konduton.

Bobi. Tre volonte, se tio bezonas klarigon.

S-ino Kent. Ĉu vi konfesas, ke vi estas edziĝinta ?

Bobi. Tre fiere mi konfesas tion.

S-ino Kent. Klarigu, do, mi petas, vian konduton pro tio, ke vi, novedzo, deklaris amon al mia nemondoscia dek-sepjara filino.

Bobi. Mi faris al Dora nenian deklaron, sed mi konfesas, ke mi sentas pri ŝi kvazaŭ ŝi estas mia propra fratino.

S-ino Bark. Kia malveraĵo ! Mi aŭdis vin deklari, ke vi enamiĝis kun ŝi je la unua vido.

Bobi (al Dora). La situacio fariĝas iom komplika. Ĉu vi permesas, ke mia edzino klarigu ĉion al S-ino Kent ?

Dora. Jes, ja, Bobi. Kie ŝi estas ?

Bobi. En la saloneto. Ŝi senpacience atendas vin.

Dora. Mi iras. Atendu. Atendu vi ĉiuj.

(Ŝi eliras kure.)

Bobi (al S-ino Kent). Mi malĝojas, Sinjorino Kent, ke mia konduto kaŭzis al vi maltrankvilon. Ĝuste la malon mi celis. Eble trozorgo pri la feliĉeco de mia edzino igis min agi senpripense. Mi fidas al ŝi por trankviligi vin.

(Dora revenas brak-en-brake kun Linda, gracie eleganta.)

Linda (etendas la manojn al S-ino Kent). Patrino ! Pardonu min !

S-ino Kent. Linda ! Mia filino ! *(Ili reciproke enbrakiĝas kaj interkisas.)* Ĉu vere estas vi ? De kie vi venas ? Kaj kie estas via edzo ?

Linda (donas la manon al Bobi). Jen mia edzo. Permesu, ke mi prezentu lin al vi, kara patrino.

(Bobi faras profundan riverencon.)

S-ino Kent. Bobi ! Via edzo ! Kian misteron ni havas ĉi tie ?

(S-ino Bark kaj Hugo volas retiri sin, sed Dora malpermesas tion per mangesto.)

Linda. Mistero facile klarigebla, panjo. Gripo kaptis min dum la vojaĝo. Mi enlitiĝis kaj Bobi konatiĝis kun Dora kaj eksciis, ke ŝi estas mia fratino. Mi estis ankoraŭ febreta, do mi ne permesis, ke ŝi venu apud min. Dora persvadis Bobi kaŝi sian identecon por ke vi konatiĝu kun li sen antaŭjuĝo.

S-ino Kent. Tion mi ja faris, kaj mi volas diri, ke pli indan bofilon ol Bobi mi ne povus trovi. *(Ŝi kisas Bobi'n kaj tiam kunigas la manojn de Linda kaj Bobi.)* Ricevu mian patrinan benon, miaj gefiloj.

Dora. Hura ! Hura ! Vidu, kara Linda, kiel bone sukcesis nia Komploto.

Linda (ridetante). Tute ne friponeto. Via Komploto preskaŭ fuŝis la tutan aferon. Mi ja sciis, ke nur estis necese, ke mi enbrakigu la patrinon, por ke ŝi pardonu min, kaj mian edzón, eĉ fremdulon.

(Kelnero eniras, portanta pleton kun glasoj kaj aperitivoj.)

Hugo. Jen ĝustatempe por tosti !

Dora. Jes, jes, ni tostu !

(La kelnero proponas trinkaĵon al ĉiuj.)

Hugo. Al mi, la sola sinjoro, la

honoron proponi toston ! Feliĉon kaj prosperon al la novgeedzoj ! Vivu !

Ĉiuj. Vivu ! *(kuntuŝas glasojn.)*

Dora. Al mi la honoron proponi duan toston ! Vivu mia bofrato, fama advokato, kaj estonta senatoro de la respubliko de Kolombio !

Ĉiuj. Vivu !


S-ino Bark (levas la glason direkte unue al la novgeedzoj poste al Dora kaj Hugo, kiuj staras flanke, man-en mane). Vivu la gekolomboj !

(Ridoj, vivuoj, plaŭdoj, kuntuŝado de glasoj.)

La kurteno malleviĝas.



Oslo Vokas Vin — Aliĝu Nun



Oslo : la Reĝa Palaco

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 237.

4-an de Marto 1952

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Februaro, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1951 :

	1951	1952
Asociaj membroj	2733	2744
Individuaj membroj		
MJ	516	503
MA	3256	2766
MS	224	354
Patronoj ..	15	8
DM	209	256
HM	58	57
	— 4278 —	— 3944 —
	7011	6688

NOVA KOMITATANO

S-ro P. M. Mabesoone, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O, Nederlando.

DELEGITOJ

Argentino

Buenos Aires. FD (Arkitekturo) : F. H. Bereterbide, Seguro 3525.

Aŭstralio

Seymour (Victoria). D : P. Holmes, 8 Villiers St. Tel : 153.

Britujo

Croydon. FD (Komerco) : vakas.

London, E.12. VD : vakas.

Romford (Essex). FD (Instruado) : W. M. Goodes, Bush Elms Secondary School, Hyland Way. Tel : 2813.

Danlando

Aarhus. D : P. Jørgensen, Tordenskjoldsgade 2—II.

Finnlando

Hämeenlinna. VD : I. Kanerva, Erot-tajakatu 10. Tel : 3223.

Helsinki. FD (Instruado) : S. Raumavirta, P. Rautatienk. 15.A.5.

Tampere. VD : S-ino H. Rannisto, Puuvillatehtaank. 11 D.

Francujo

Angers. D. kaj FD (Katolikismo) : vakas.

Bethune. FD (Juro) : vakas.

Clermont (Oise). FD (Juro) : H. Vis, 17 rue du Général Pershing.

Croix (Nord). D : L. Giloteaux, 28 rue des Jardins.

FD (Junularo) : La D.

Germanujo

Frankfurt/Main. VD : vakas.

Hispanujo

Reus. D : vakas.

Hongkongo

Hongkong. D : vakas.

Hungarujo

Tápiószele. D : T. Kovács, Pörös-dűlő 1.

Izraelo

Hadera. D : A. Davidovics, Rechov Rambam 1—II.

Tel-Aviv. FD (Konsum-komerco) : B. Wallach, P.O.B.2460.

Kuwait

Kuwait. D : F-ino E. Waller, c/o Kuwait Oil Co. Ltd., Ahmadi, Kuwait, Persian Gulf.

Madagaskaro

Tananarive. D : M. Bourgeois, Ambohidahy.

Maroko

Rabat. D : P. Lecoœur, 2 Avenue Moulay Youssef. Tel : 39—86.

Nederlando

Den Haag. FD (Impostaj aferoj) : vakas.

Den Helder. D : F-ino M. Van Nienes, Tuinstraat 70.

Norvegujo

Kongsberg. D : Sigurd L. Haugen, Skavanger. Tel : 342.

Nov-Zelando

Auckland. FD (Konstruado) : J. G. Kennerley, 87 Kurahaupo St., Orakei, Auckland, S.E.2.

Sud-Afriko

Pietermaritzburg. VD : S. de Waal, 287 Alexandra Road. Tel : 2-1345.
FD (Konstruado) : La VD.

Svedujo

Göteborg. FD (Fotografado amatora) : vakas.

Malmö. FD (Akvokonduko) : vakas.

Urugvajo

Fray Marcos. FD (Katolikismo) : vakas.
FD (Odontologio) : La D.

Montevideo. FD (Katolikismo) : R. A. Barbieri, Sierra 2140.

Usono

Sacramento (California). D : F-ino I. B. Craig, 450, 45th. St. Tel : Hi. 5-6924.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Wilford, F-ino N., Nottingham, Anglujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1952

- 313. Schiavi, S-ro V., Kampala, Ugando
- 314. Dionisio, S-ro C. H., São Leopoldo, Brazilo
- 315. Arzani, S-ro A., Doncaster, Anglujo
- 316. Araujo, F-ino I. B. de, Rio de Janeiro, Brazilo
- 317. Araujo, S-ro G. S. de, Rio da Janeiro, Brazilo
- 318. Simon, S-ro P. E., Porto Alegre, Brazilo
- 319. Timponi, D-ro M., Rio de Janeiro, Brazilo
- 320. Debrouwere, S-ro G., Kortrijk, Belgujo
- 321. Murteira, D-ro C., Bragança, Portugalujo
- 322. Kennerley, S-ro J. G., Auckland, Nov-Zelando
- 323. Clarkson, S-ro R. J., Tauranga, Nov-Zelando
- 324. Holloway, S-ro J. F., Trentham, Nov-Zelando
- 325. McNamara, S-ro M. L., Auckland, Nov-Zelando
- 326. Schofield, S-ro B. S., Bury, Anglujo
- 327. Olsson, S-ro O., Lund, Svedujo
- 328. Hervet, S-ro M., Oran, Alĝerio
- 329. Gisbert, S-ro R., Barcelona, Hispanujo
- 330. Sinclair, F-ino P. C., Buckhaven, Skotlando
- 331. de Nerini, S-ino M., Maracaibo, Venezuelo
- 332. Lecoœur, S-ro P., Rabat, Maroko
- 333. Bemaldo, S-ro L., Lisboa, Portugalujo
- 334. Gomez, S-ro F., Romorantin, Francujo
- 335. Petit, S-ro P., Rosny-sous-Bois, Francujo
- 336. Courtis, S-ro A., Port-Gentil, Gabon
- 337. Jacobson, S-ro J., Nordmaling, Svedujo
- 338. Tronchon, S-ro H., Casablanca, Maroko
- 339. Tronchon, S-ino Y., Casablanca, Maroko
- 340. Trier, S-ro B. S., Haslev, Danujo
- 341. Bovit, S-ro J., Westfield, N.J., Usono
- 342. Jaehn, S-ro W., Düsseldorf, Germanujo
- 343. Leipold, S-ro M., Weiden, Germanujo
- 344. Biewer, S-ro J., Darmstadt, Germanujo

345. Kolb, Prof. L., Ludwigshafen, Germanujo

346. Beliard, S-ro L., Nantes, Francujo

347. Rydén, F-ino E., Lärje, Svedujo

348. Blacklock, S-ino A. L., Ipswich, Anglujo

349. Cocks, S-ro E. P. B., Trentham, Anglujo

350. Dickson, S-ino E., Letchworth, Anglujo

351. Sayers, S-ino E. T., Brooklyn, N.Y., Usono

352. Sayers, S-ro J. D., Brooklyn, N.Y., Usono

353. Breth, S-ro F. W., Petrolia, Penn., Usono

354. Collins, S-ro E., Hamilton, Ont., Kanado

355. Poly, S-ro P., Paris, Francujo

356. Skole, S-ro S. B., Hjørring, Danujo

357. Carrfors, S-ro H., Bromma, Svedujo

358. Merrill, S-ino F., Timperley, Anglujo

359. Ihrborn, S-ro O. N., Klågerup, Svedujo

360. Wong, S-ro C. S., Penang, Malayo

361. Quillivic, S-ro J., Marrakech, Maroko

362. Collier, S-ro B., Pinckney, Mich., Usono

DONACOJ. C. T. J. Birch 5ŝ., W. Westmancote 5ŝ., W. A. Cather 5ŝ., W. Cunningham 5ŝ., S-ino N. Goodliffe 2ŝ. 6p., F-ino I. Cochrane 2ŝ. 6p., R. Gisbert 27ŝ., W. H. King 20ŝ., Bournemouth Esp. Grupo 50ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Esperantista Vivo

Naskiĝo

Haus. Al Ges. Josef Haus (Am Gatherhof 43, 22a Düsseldorf-Rath, Germanujo) tria filino Michaela Elisabeth, je 26 februaro 1952.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.—Red.

Cocks, Charles P., U.E.A. FD en Croydon, Anglujo, je 29 februaro 1952.

Whitaker, D-ro Sydney M., en Rochdale, Anglujo, je 12 oktobro 1951, 88-jara. Pioniro de 1903.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Kaj ili diris unu al alia : Ĉu nia koro ne brulis en ni, dum li parolis kun ni sur la vojo, dum li klarigis al ni la Skribojn ? *S-ta Luko 24.32.*

Ne-katolikoj kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, LOONOPZAND (N. Br.), Nederlando.

Kiu serioze interesiĝas pri "flugantaj subtasoj" (spacoŝipoj el alia planedo ?) tiu bonvolu skribi al E. Biddle, 1513 High Road, LONDON, N.20, Anglujo.

Pri bredado de abeloj : A. P. Andersen (Nederlando). Prezo 5ŝ. 6p. Mendu ĉe U.E.A. aŭ ĉe vialanda libroservo.

Esperanto-Asocio de New York kunvenas ĉiumonate. Ĉiuj bonvenaj. Telefonu : BU-4 0963. Dormont.

Bicikla tendisto deziras korespondi kun Franca samideano. Blake, 'Hilton', Tower Hill, HORSHAM, Sussex, Anglujo.

2,000-geklubanoj deziras korespondi. Esperanto Koresponda Klubo, 260 Oka-Shinmachi, HIRAKATA-CITY (Osaka), Japanujo.

Al miaj korespondantoj mi sendas salutojn : Gertrud Heinrich (nask : Kilian —el Berlin). Nova adreso : HINES CREEK (Alberta), Kanado.

Karaj samideanoj, multajn dankojn ; mi ricevis sufiĉe da korespondaĵoj kaj ne povos respondi al iu post apero de tiu ĉe anonceto. R. Dillarstone, Sek. Esperanto-Klubo, SOUTH SHIELDS, Anglujo.

24-jara germano, E-novulo, serĉas laboron kiel ribkultura laboristo, prefere sudfranca vinbienego. Federico Neumeister, (22c) BAESWEILER, Roskaul 10a, Germanuo.

Mi volas interkorespondi pri la temo : Evangeliaj interpretoj laŭ la spiritisma konvinko. H. M. Tedesco, Rua Raul Pompeia 248, SAO PAULO, Brazilo.

Vigla junular-grupo okazigos leter-vesperon en aprilo. Skribu multnombre ; nepra respondo. "Esperanto-Junularo", ASCHAFFENBURG, Poŝtfako 564, Germanujo.

Svedo deziras interŝanĝi pm. kun la tuta mondo. Bonajn nordajn pm. garantias S-ro S. Hillström, Törnlundsgatan 12, UPSALA, Svedujo.

Anonco ĉiamvalora. Tutmondaj gesamideanoj ! Sendu al mi cent poŝtmarkojn

aŭ du bonajn ilustritajn gazetojn de via lando kaj demandu al mi laŭplaĉe per leteroj bele afrankitaj. Respondo garantiata. Adão Barnabé dos Santos Cavalcanti, Delegito de Universala Esperanto-Asocio, VITORIA DE SANTO ANTAO, Pernambuco, Brazilo.

30 geesperantistoj korespondos tutmonde. Skribu al Hatano Ikuo, Samedono-ĉo 53, NISHINOMIYA, Japanujo.

36-a Brita Kongreso de Esperanto okazonta Pentekoston. L.K.K. invitas gesamideanojn demonstri al la publiko nian solidarsenton per sendo de simpla salutkarto, -letero. Antaŭdankon ! Adreso : 57 West Vallum, NEWCASTLE-UPON-TYNE 5, Anglujo.

Mi serĉas homon, kiu morale volas helpi ! Sendu al 29-jara fraŭlo informojn pri enmigro-eblecoj en unu el la Sud-Amerikaj landoj. Afrankkostoj rekompencotaj. Represo dezirata. Korespondadon peras Pieter Schilperoord, Borneolaan 7, ZEIST, Nederlando.

Grava Esperanta Ekspozicio en Blackburn, Anglujo, Sept. 24-30. Bonvole sendu ĉiajn aĵojn pri Esperanto en edukado, scienco, turismo, k.t.p. ankaŭ leterojn al S-ro A. J. Leather, Colleston, Pleckgate Road, BLACKBURN, Lancs., Anglujo.

Esperantista Societo "La Adriatika Stelo", Pula, fine de Majo aranĝos letervesperon kaj propagandan ekspozicion kaj petas la tutmondan gesamideanaron sendi leterojn, bildkartojn, reklamojn, broŝurojn kaj librojn. Adreso : La Adriatika Stelo, Gradska biblioteka, PULA, Jugoslavujo. Ni certe respondos.

Belga Fremdultrafika Servo. Bonvolu sendi : Eŭropajn Vojaĝprospektojn, adresojn de vojaĝentreprenoj. Mi rekompencos. 109 Konijnenperken, BOSVOORDE-BRUSSEL, Belgujo.

Sekretariino serĉas korespondadon per leteroj aŭ il. pk. kun gesamideanoj tutmondaj (nur gekolektantoj de pm. ne dezirataj). Marie Laade, Mariendorfer Str. 34a, BERLIN-STEGLITZ, Germanujo.

Atentu ! 45-jara svedo deziras ŝanĝi uzitajn poŝtmarkojn laŭ Zumstein kun Svislando, Anglujo, Aŭstrujo kaj Nederlando. Sendu iujn bonajn markojn kaj vian mankoliston de Svedujo. Certe respondas Karl Johansson, Essinge Brogata 12, 2 tr., STOCKHOLM K., Svedujo.

LITERATURA KONKURSO

Okaze de la **XIII-a Hispana Kongreso de Esperanto en Valencia**
(26-29 Julio 1952)

Hispana Esperanto-Federacio invitas ĉiujn verkistajn samideanojn konkuri en ĉi tiu beletra konkurso, kie belaj premioj atendas rekompenci la plej trafajn verkojn ricevitaĵn de ĉiulandaj aŭtoroj, kiuj povas partopreni laŭ jenaj reguloj :

1-a (verso) **LIRIKA POEZIAĴO**, originala aŭ traduka, kun libera elekto pri rimo kaj metriko.

2-a (prozo) **MALLONGA NOVELO**, originala aŭ traduka, kun libera elekto pri stilo kaj temo.

Ĉiuj verkoj estu nepre nepublikigitaj, en la senco ke ili ne estas ankoraŭ senditaj al alia simila konkurso. La tradukojn oni devos akompani per kopio en la originala lingvo. Ĉiujn materialojn oni sendu, ne pli malfrue ol la 15-an de Junio, al :

**Organiza Komitato de la
XIII-a Hispana Kongreso de Esperanto,
Pelayo 7, I, Valencia, Hispanujo**



Jus aperis

en esperanta traduko de E. A. Haugen
la ĉefverko de la norvega literaturo :

Ibsen : PEER GYNT

Prezoj : bind. 15 ŝil., afranko 6p.
 broŝ. 12 ŝil. 6p., afranko 6p.

**Mendu ĉe via librovendisto aŭ ĉe
U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo**

ĈU VI IROS AL OSLO ?

Se jes, komencu vian vojaĝon unu semajnon pli frue kaj partoprenu la internaciajn feriajn E-kursojn en Helsingør, Danlando, 25/7-1/8, sub auspicio de UEA. Speciala karavano, malmultekosta, de Helsingør al Oslo kaj reen estos aranĝata. Petu prospekton pri la kursaranĝoj ĉe

**S-ro L. Friis, Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando**

PREMAJ ROMANETOJ

Verkitaj de konkursintoj
23 mallongaj noveletoj diverstemaj.
96 paĝoj, broŝ.

Prezo 1 ŝil., afranko 2p. aŭ 4 rpk.

**Mendu ĉe U.E.A.
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo**

